

Revuo
ESPERANTO
Internacia

N-ROJ 560-1 (7-8) JUL.-AŬG. 1952



Ekzemplo de afiŝo traŝe reklamanta Esperanton

(vidu paĝon 204)

45a Jaro

Julio-Aŭgusto 1952

N-ro 560-1 (7-8)

Oficiala organo de
Universala Esperanto-Asocio

Fondinto : H. HODLER

Redaktoro : HANS JAKOB

Helpredaktoro : MASON STUTTARD

Ĉion por la redakcio sendu al
ESPERANTO
Palais Wilson, Genève, Svis.
Urgajn informojn sendu rekte
al Rickmansworth

Traduko kaj represo de artikoloj estas
permesataj, kondiĉe ke oni citu la fonton.
Oni sendu tian represaĵon al nia redakcio.

Ĉion pri administrado de UEA kaj de la
revuo ESPERANTO, abonado, reklamoj,
anoncetoj sendu al
UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
Heronsgate, Rickmansworth, Herts.,
Anglujo

Jara abono (1952) : 15 ŝil. anglaj (kun
membreco kaj jarlibro 20 ŝil.)
Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj

Tarifo por reklamoj :
1 paĝo £6 ½ paĝo £3
¼ paĝo 30 ŝil. ⅛ paĝo 15 ŝil.
Anoncetoj pri korespondado :
2 pencoj por unu vorto aŭ 1 int. respond-
kupono por ĉiu duo da vortoj

Legantoj en 74 landoj
Eldonnumero 6000



Enhavo

	Paĝo
La tekniko de informado : D-ro I. Lapenna :	
Tri Branĉoj de Nia Aktiveco	193
Organiza Skemo de la Informaj Fakoj	195
Ĝenerala Plano de Informado por 1952-53	196
Por Eviti Fatalajn Erarojn !	199
Devizoj	200
Ekspozicioj	201
Afiŝoj : Flugfolioj	204
Specialaj artikoloj :	
Fastkalkula bildo en Katalunujo : Prof. D-ro Joan Amades	215
Lofthus, Juvelo de la okcidenta Norvegujo	219
Ekvido en la Pasintecon : S-ino Erika Linz	221
La 37-a Universala Kongreso de Esperanto	210, 219
Konstantaj Rubrikoj :	
Centro de Esploroj kaj Dokumentado	206
Enigma Konkurso N-ro 70	214
Esperantista Vivo	224
Internacia Konkurso 1952	216
Nia Forumo	217
Oficiala Informilo	223
Radio kaj Esperanto	207
Tra la Libraro	208
Tra la Mondo Esperantista	211

La venonta (septembra) numero aperos ĉirkaŭ 15 sept.
pro la neceso atendi raportojn pri la U.K. en Oslo

Revuo

ESPERANTO

Internacia

N-roj 560-1 (7-8)

JULIO-AŬGUSTO 1952



Tri Branĉoj de Nia Aktiveco

ENKONDUKE estas necese ripeti kaj substreki ankoraŭfoje :

La tuta aktiveco de la organizita Esperanto-Movado konsistas el tri fundamentaj branĉoj: informado, instruado, praktika aplikado.

Nur la harmonia kunekzisto kaj la reciproka helpo de la tri branĉoj povas doni vere kontentigajn rezultojn.

Tiu ĉi per si mem tiel simpla kaj unuavide tre komprenebla vero ankoraŭ ne estas sufiĉe atentata. Pli malbone: kelkfoje ĝi estas absolute neglektata.

Tial okazas, ke en kelkaj landoj aŭ lokoj—ĉiu esploru la ĝustecon por la sia—oni faras relative grandan bruon por Esperanto, sed neniu zorgas, ke ĝi estu samtempe lerte ekspluatata por instrui la lingvon al tiuj, kiuj ekinteresiĝis. Aliloke oni pacience, de jaro al jaro, sen ia ajn antaŭpreparo malfermas ĉiam novajn kursojn, al kiuj aliĝas du, tri hazardaj piete-pasantoj. Kaj eĉ tiuj malaperas senpostsigne antaŭ la kvara leciono! La organizantoj tiam kun iom acida, sed tre supereca mieno pesimisme plendas pri la “nuntempa generacio”, kiu “interesiĝas pri nenio krom pri sporto kaj amuzoj”.

Plej ofte—eĉ se oni afentis al taŭga informado kaj al bona organizo de la kursoj—la tuta afero fiaskas en la tria stadio. La grupoj—tiuj niaj, almenaŭ

teorie, konstantaj lernejoj de la lingvo, fajrujoj de tuthomeca spirito esence ligita al Esperanto, fundamentaj kadroj de diversflanka aplikado de la lingvo—estas tro ofte sufiĉe malproksimaj de siaj taskoj. Kutime niaj grupoj ankoraŭ vivetas laŭ la tradicioj hereditaj de la unuaj Esperanto-societoj el la XIX-a jarcento, sed sen ilia vervo kaj entuziasmo. Kontraŭvole altrudiĝas komparo: la nunaj lokaj grupoj kelkfoje similas—ne pro sia konsisto, sed pro la labormetoj—al malnovaj kaleŝoj kun kadukaj ĉevaloj kaj blankbarbaj koĉeroj. Tre pitoreske, eble! Tamen, la generacio el la mezo de la XX-a jarcento preferas aŭtomobilojn aŭ aviadilojn. Jen la kerno de la tuta problemo!

Esceptaj estas la lokoj, en kiuj la tri elementoj bone funkcias kaj en kiuj, tial, la progresado estas rimarkinda.

Se oni taksas ĉiun el la tri branĉoj izolate unu de la alia, oni povas konstati: la informado pliboniĝas de jaro al jaro; la instruado havas ĉiujn eblecojn (lernolibroj, instruantoj) por kontentige solvi sian taskon; la grupoj—kun kelkaj esceptoj, kompreneble—estas nia malforto. Sed la ĉefa vundo estas, ke la tri aspektoj ne estas paralele atentataj kaj harmonie kunordigitaj. Plej ofte unu aŭ du el la tri faktoroj malfunkcias.

Ĝuste tio estas mortiga por la tuto. Ĝuste tial la rezultoj ankoraŭ ne respondas kaj ne povas respondi al la grandega kvanto da energia laboro, donata ĉiujare de centoj kaj miloj da sinoferemaj militantoj por nia afero tra la mondo. Kiam la gvidaj instancoj de niaj landaj asocioj komprenos kaj solvos tiun problemon, tiam nia progresado estos multe pli kontentiga el ĉiuj vidpunktoj.

En la hodiaŭa numero ni dediĉas kelkajn paĝojn al nur unu el la tri branĉoj, al informado. Tio ne signifas, ke ĝi estas la plej grava. La tri estas

same gravaj, ĉiu laŭ sia karaktero. Sed ĝi estas la baza : kia, la informado, tiaj la estontaj kursanoj, tiaj la estontaj esperantistoj.

La kelkaj ideoj, kiuj sekvos, estu konsiderataj ne kiel devigaj instrukcioj, sed kiel amikaj konsiloj, kiuj eble povus kontribui al plibonigo de nia informado. Se oni trovos ilin aplikeblaj aŭ almenaŭ adapteblaj al diversaj landoj, lokoj aŭ fakoj, oni tion faru precipe en la aŭtunaj kampanjoj antaŭ la novaj kursoj.

D-ro Ivo Lapenna.

Noto de la Red.—Ĉiuj artikoloj kaj sciigoj pri informado en tiu ĉi numero de nia revuo estas verkitaj de Prof. I. Lapenna, la Estrarano pri informado kaj la honorofica direktoro de la Centro de Esploroj kaj Dokumentado de UEA.



Parto de ekspozicio en Plymouth, Anglujo. La pupetoj vestitaj per naciaj kostumoj altiris multajn rigardantojn.

Ni dankas pro la kliŝo al la Brita Esperantista Asocio.

Organiza Skemo de la Informaj Fakoj

POR doni al nia informado kiel eble plej grandan efikon, estis necese, ke :

1. UEA, la landaj kaj fakaj asocioj, la lokaj grupoj, formu apartajn informajn fakojn, kies celo estas la diskonigo de nia lingvo kaj de ĝia signifo ;

2. La sferoj de aktiveco inter la diversaj informaj fakoj estu klare fiksitaj ;

3. Regu, almenaŭ ĝis certa grado, libervole akceptita disciplino tiel ke, post komuna interkonsento, oni agu harmonie kaj kunligite por la fiksita celo.

Surbaze de tiuj principoj komenciĝis la organiza laboro :

1. *La Informa Fakoj de UEA* estis fondita kiel "Propaganda" fakoj dum la Universala Kongreso en Bournemouth (1949). De post la Pariza Kongreso (1950) ĝin gvidas Estrarano D-ro Lapenna. En la Pariza Kongreso estis ankaŭ fondita la Gazetara Servo de UEA sub la gvido de Komitatano E. Adamson. Ek de la 1-a de Januaro 1952 funkcias la Centro de Esploroj kaj Dokumentado, kies aktiveco ligiĝas al tiu de la Informa Fakoj.

Sekvante la konsilojn de la Informa Fakoj de UEA, la landaj kaj fakaj asocioj komencis unu post la alia organizi en siaj kadroj apartajn informajn fakojn aŭ servojn. Kutime ili ŝarĝis unu el siaj komitatoj okupiĝi pri tiu tasko. En kelkaj landoj la informa fakoj aŭ servo estis formita kiel malgranda komitato, konsistanta el 2-3 personoj. Ĝis nun tiajn fakojn formis la argentina, aŭstralia, belga, brazila, egipta, germana, hispana, itala, jugoslava,

nederlanda, nordamerika, norvega, sveda, svisa kaj urugvaja landaj asocioj ; krome, ISAE el la fakaj. Sen troigo oni povas diri, ke la plej bone organizita estas la itala sub la lerta gvidado de S. Fighiera. Ĝi ankaŭ atingis la plej rimarkindajn rezultojn. La landaj informaj fakoj havas kutime siajn kunlaborantojn en diversaj lokoj de sia teritorio.

2. *La sferoj de aktiveco estas :*

(a) Informa Fakoj de UEA : informado al OUN, UNESKO kaj aliaj gravaj internaciaj organizaĵoj ; rekta interveno en internaciaj medioj ; harmoniigo de la tuta informa laboro en mondaj kadroj ; liverado de konvena materialo al la landaj kaj fakaj informaj servoj. Tiujn taskojn UEA plenumas pere de la C.E.D. kaj ĝiaj 61 kunlaborantoj en 16 landoj ; pere de regulaj informoj de la Gazetara Servo, liverataj al la landaj kaj fakaj informaj servoj ; pere de sendado de informa materialo (ekz. Alvoko al sciencistoj, Statistiko pri la Esperanto-Movado, Teksto de letero al membroj de neesperantistaj kongresoj, Artikolo pri D-ro Zamenhof, k.a.).

(b) Informaj servoj de landaj kaj fakaj asocioj : realigo de la konsiloj de la Informa Fakoj de UEA ; organizo de la informado sur sia teritorio ĉu pere de la lokaj grupoj, ĉu pere de apartaj kunlaborantoj ; studado de la informaj metodoj, kiuj pleje taŭgas por la koncerna medio ; liverado de informa materialo (afiŝoj, flugfolioj, tipaj prelegoj, veturantaj ekspozicioj) al la lokaj grupoj kaj al la kunlaborantoj ; organizo de bona gazetara servo kun freŝdataj informoj por la landa gazetaro.

(c) Lokaj grupoj kaj kunlaborantoj: realigo de la planoj de la landaj kaj fakaj informaj servoj; adaptado de la informado al la lokaj cirkonstancoj.

3. *Por harmoniigi la laboron*—krom la regula skriba kontakto per cirkuleroj kaj leteroj—okazas ankaŭ apartaj kunvenoj de la reprezentantoj de la informaj fakoj de UEA, de la landaj kaj fakaj asocioj. La unua kunveno okazis en Munkeno (1951), la dua okazos en Oslo (1952). Tiu ĉi numero de “Esperanto” havas la saman celon.

Tia estas, en plej skizaj trajtoj, la organiza skemo de la laboro sur la

kampo de informado. Kvankam ni estas ankoraŭ sufiĉe malproksimaj de perfekta funkciado, tamen la ĝis nun atingitaj rezultoj povas esti konsiderataj kiel serioza paŝo antaŭen. Ni nur memorigu, ke en la laborjaro 1950/51 estis publikigitaj 9.289 artikoloj kaj informoj pri la Internacia Lingvo, ke pri la sama temo okazis en tiu jaro 684 radioprelegoj kaj 780 publikaj prelegoj. De tiu nia informado estis tuŝitaj ĉ. 17.700.000 personoj.

Kiam ni sukcesos enkonduki ankoraŭ pli da organiziteco en tiun gravegan laboron, la rezultoj sendube estos multe pli kontentigaj.

Generala Plano de Informado por la laborjaro 1952-53

LA celo de nia informado en la sekvanta laborjaro devus esti ekinteresi pri Esperanto kaj altiri al lernado de la lingvo tiujn elementojn de ĉiuj sociaj tavoloj, kiuj jam havas inklinon al tutmonda pensmaniero, aŭ almenaŭ al konceptado transpasanta la naciajn kadrojn. Tiaj elementoj estas troveblaj ĉie, en ĉiuj klasoj kaj en ĉiuj profesioj. Hodiaŭ ili estas precipe troveblaj inter la laboristaro kaj la studentaro.

Jam la pasintjara kunveno de informaj fakoj (Munkeno, 1951) konstatis la grandan mankon ĉe intelektularo kaj junularo speciale en la okcidenteŭropa movado. Konsiderante tiun fakton, oni devus dediĉi apartan atenton al la junularo, precipe al la studentaro, al la geinstruistoj kaj al la geintelektuloj ĝenerale.

Tio, kompreneble, tute ne signifas, ke ni devas malatenti la aliajn sociajn

tavolojn aŭ la aliajn profesiojn kaj okupojn. Tio nur signifas, ke al la menciitaj medioj ni devus dediĉi apartan atenton.

Al tiu fundamenta celo adaptigu la enhavo kaj la formo de nia informado en la sekvanta laborjaro.

Konstanta informado— aŭtuna kampanjo

La tuta laboro sur nia kampo de aktiveco estas dividebla je 1) konstanta informado kaj 2) aŭtuna kampanjo antaŭ la novaj kursoj.

La konstanta informado konsistas el regula (dum la tuta jaro) liverado de dokumentoj, artikoloj, sciigoj kaj alia informa materialo al diversaj instancoj, gazetoj, revuoj, k.t.p. laŭ la principoj prezentitaj en alia artikolo.*

* Vidu la artikolon “Organiza skemo de la informaj fakoj” sur p. 195.

Laŭ la cirkonstancoj en diversaj landoj, oni povas, kompreneble, utiligi gravajn datojn (ekzemple la naskiĝtagon de D-ro Zamenhof, iun jubileon k.s.) aŭ apartajn okazojn (ekzemple iun internacian kongreson) por intensigi la informadon.

La aŭtuna kampanjo okazu antaŭ la malfermo de la novaj kursoj. Ĝi konsistu el du ĉefaj partoj:

(a) Ĝenerala: 1-2 interkonsente elektitaj devizoj, ripetataj kaj presataj tiel multe, ke centmiloj da personoj ilin aŭdu aŭ legu; prelegoj por ĝenerala publiko; afiŝoj pri novaj kursoj; flugfolioj; ĝeneralaj ekspozicioj.

(b) Aparta: prelegoj en la medioj, kiuj speciale nin interesas (ekzemple universitatoj, geinstruistaj societoj, junularaj asocioj); flugfolioj kaj

afiŝoj, se iel eble adaptitaj al la koncernaj medioj; artikoloj kaj informoj en la koncernaj fakaj revuoj (ekzemple studentaj, sciencaj, artaj, instruistaj); specialaj ekspozicioj, montrantaj la atingojn de Esperanto en la koncerna fako (ekzemple ekspozicio de scienca literaturo kaj fakaj vortaroj en universitato).

Oni devas klopodi, ke dum la kampanjo la samaj medioj estu atakataj de pluraj flankoj kaj en pluraj formoj. Ne sufiĉas aperigi artikoleon, aŭ aranĝi sensignifan ekspozicion, aŭ okazigi nereklamitan prelegon! Sole la vasta kombino de ĉiuj metodoj (artikoloj, informoj, afiŝoj, flugfolioj, ekspozicioj k.t.p.) en relative mallonga tempo (unu ĝis du semajnoj) povas doni vere efikajn rezultojn.



De 1 Sept. ĝis 18 Okt. 1951 okazis granda ekspozicio en la restoracio de la Kopenhaga Universitato. En 40-metra vitrino oni klarigis pri Esperanto, pri ĝia gazetaro kaj pri ĝia literaturo. Duono de la ekspozicio montris la praktikan aplikon de Esperanto por studentoj kaj altlernejoj: tiu parto temis pri sciencaj eldonaĵoj kaj pri la internaciaj arkeologiaj tendaroj.

Ni dankas pro la foto al S-ro Vesterland-Andersen.

Por doni ideon pri la necesa kvanto de informa materialo, ni diru, ke por atingi bonan rezulton en urbo de proksimume 250.000 loĝantoj estus necese: disdoni proksimume 10.000 flugfoliojn; dismeti ĉ. 500 afiŝojn pri la novaj kursoj en taŭgaj lokoj; organizi almenaŭ unu ekspozicion en konvenaejo aŭ en elmontrofenestro de libro-magazeno en trafikata strato; aperigi minimume du, tri artikolojn kaj dekon da informoj en la loka gazetaro; laŭ ebleco okazigi almenaŭ unu grandan publikan prelegon kaj plurajn specialajn prelegojn en medioj, kiujn ni deziras interesigi. La spertoj montris, ke tia informado, se ankaŭ laŭ la enhavo ĝi estas altnivela, altiras al la novaj kursoj en tia urbo proksimume 150-300 personojn.

Financaj rimedoj

La ĝenerala situacio en diversaj landoj kaj la financa situacio de niaj landaj asocioj, societoj, grupoj kaj informaj fakoj estas tiel diferenca, ke ne estas eble doni ĝeneralan formulon por solvi la financan flankon de la afero. Ni havas landajn asociojn kun budĝeto de pli ol 3,000 pundoj jare, sed ni havas ankaŭ landajn asociojn, kiuj ne enspezas pli ol kelkajn pundojn. La sperto tamen montris, ke por organizi bonan informadon pli gravas energia volo kaj ofero ol financaj rimedoj. Tute egale ĉu oni disponas aŭ ne pri apartaj financaj rimedoj por la informado, la kostoj de la aŭtunaj kampanjoj en ĉiu okazo devus esti pagitaj de la kursanoj. Se oni ne farus senpagajn kursojn (kio bedaŭrinde estas nova erara tendenco en nia movado), sed se oni iom digne pagigus la kursanojn, tiam estus ne nur kovritaj ĉiuj elspezoj, sed eĉ restus iom da profito por la estonta laboro sur la kampo de informado. La spertoj el kelkaj urboj pruvis ankaŭ tion.

Tri etapoj

La aŭtuna kampanjo estu plej atente preparita de ĉiuj informaj fakoj, de ĉiuj landaj asocioj, kiuj ankoraŭ ne havas tiajn fakojn, kaj de ĉiuj niaj societoj kaj grupoj. Tiucele oni formu, se tiaj ne jam ekzistas, apartajn komitatojn, kiuj preparu la tutan materialon. En la kampanjo mem partoprenu kaj helpu absolute ĉiuj membroj de niaj organizaĵoj. Ili akurate plenumu la taskojn, kiujn ili ricevos de siaj informaj fakoj aŭ de la komitatoj ŝargitaj pri organizo de la kampanjo.

Estas konsilinde utiligi la nefermitan leteron al Stalin, kaj la Universalan Kongreson en Oslo por antaŭprepari la aŭtunan kampanjon, tiel ke la tuta laboro havos tri etapojn.

La nefermita letero al J. V. Stalin estas jam sendita kiel aparta dokumento al ĉirkaŭ 200 gravaj internaciaj organizaĵoj kaj institucioj. Pere de la kunlaborantoj de C.E.D. ĝi jam aperis komplete aŭ parte en pluraj naciaj lingvoj. Estus bone, se tiu grava dokumento (en perfekta nacilingva traduko, kompreneble) aperus ankaŭ en la aliaj naciaj lingvoj.

Dum la U.K. en Oslo funkcios aparta gazetara servo, kiu eldonos ĉiutage multobligitan bultenon. Ĉiuj informaj servoj komisiu taŭgan personon fariĝi korespondanto de la ĉefaj gazetoj de la lando. En Oslo tiuj komisiitoj ricevos ĉiutage la bultenon, kiun ili povos vaste utiligi por sendado de raportoj pri la Kongreso al sia landa gazetaro. Estas gravege, ke tio okazu jam el Oslo, ĉar nur freŝdataj informoj estas volonte akceptataj.

Post tiuj du ondoj de atakoj la aŭtuna kampanjo sendube havos pli da ŝancoj kaj ĝi donos pli efikajn rezultojn.

Por Eviti Fatalajn Erarojn !

LA celo de la suba listo ne estas riproĉi, sed nur atentigi pri kelkaj gravaj eraroj, kiuj estas preskaŭ regule farataj de la personoj okupiĝantaj pri disvastigo de nia lingvo. Tiuj eraroj, konstante ripetataj, kreas falsan opinion pri Esperanto kaj, el psikologia vidpunkto, influas tre malbone ne nur la publikon, al kiu la informado estas direktata, sed ankaŭ la esperantistojn mem. Anstataŭ atingi pozitivan rezulton, oni tiele atingas la malon. Por eviti tion en la estonteco, estus utile atenti al jeno :

1. *Evitu la vorton "propagando" !* Ĝi estas tro kompromitita. Ĝi ŝokas kaj malproksimigas anstataŭ altiri. Se nepre necese, nomu la laboron sur la kampo de disvastigo de la lingvo "informado", aŭ, se iel eble, ne donu al ĝi ian ajn nomon.

2. *Donu al la lingvo la nomon "Esperanto" aŭ "La Internacia Lingvo"*, aŭ kombinu la du nomojn ! Ofte oni donas al Esperanto aliajn nomojn (ekzemple "interlingvo", "monda lingvo", aŭ simile) kaj oni aldonas tute superflujajn aŭ eĉ erarigajn epitetojn (helpa, artefarita, arta, dua k.t.p.). Tio naskas konfuzon kaj falsan opinion, ke ekzistas pluraj "internaciaj" lingvoj. Tio, plue, kreas la stultan starpunkton pri kvazaŭa duagradeco aŭ eĉ lastrangeco de Esperanto kiel lingvo. Tio, fine, elvokas ĉe multaj esperantistoj senton de malplivaloro. Plej bone estas nomi Esperanton "La Internacia Lingvo", ĉar :

(a) Ĝi fakte estas internacia laŭ sia strukturo, laŭ sia celo kaj laŭ sia praktika apliko ;

(b) Zamenhof mem tute prave nomis ĝin tiel ;

(c) Per tio vi helpas firmigi la pozicion de Esperanto kiel *la* internacia lingvo de la hodiaŭo ;

(d) Vi malebligas, ke iu ajn ŝtelu al ĝi tiun nomon, kiu respondas fakte nur al pozicio de Esperanto.

3. *Ne parolu pri la aliaj projektoj !* Preskaŭ ĉio, kion oni legas aŭ aŭdas pri diversaj projektoj kaj projektetoj de komuna lingvo, estas skribita aŭ dirita de esperantistoj. Diskuti kun mortnaskitoj ne havas sencon ! Ankaŭ tio kreas teruran konfuzon kaj grave malhelpas la pli rapidan disvastigon de Esperanto.

4. Se oni nepre estas devigata ion diri ankaŭ pri la aliaj projektoj, *oni bone distingu inter Esperanto—vivanta lingvo—kaj tiuj projektoj !* La esperantistoj mem fine komprenu, ke longega estas la vojo de projekto ĝis evoluinta, vivanta, literatura kaj scienca lingvo. Estas nek objektive nek science trakti ambaŭ laŭ la sama mezurilo kaj nomi ambaŭ per la sama nomo. Ni mem estu pli justaj rilate al nia lingvo !

5. *Evitu ĉion, kio impresas strange kaj sektece !* Tro da steloj kaj flagoj, kantado de la himno en nekonvenaj lokoj (ekzemple : surstrate aŭ en kafejo), utiligo de obskuraj keloj por kunvenoj, ekspozicioj, prelegoj ktp., uzado de Esperantlingvaj vortoj (ekzemple : samideano, interna ideo, verda popolo k.s.) en nacilingvaj tekstoj k.t.p.—ĉio ĉi malproksimigas de la afero ĝuste tiujn elementojn, kiujn ni pleje bezonas en la movado. Memoru, ke ĉia ajn bruo pri Esperanto sendube iun altiros, sed memoru ankaŭ tion, ke de la kvalito de la "bruo" dependas la kvalito de la estontaj esperantistoj.

6. *Evitu la epiteton "verda" !* Ofte en nacilingvaj tekstoj oni povas legi pri verda popolo, verda familio, verda semajno, k.t.p. La samon oni povas aŭdi en nacilingvaj paroladoj pri nia afero. Ankaŭ tio impresas iom neserioze, sektece. Krome, oni donas al kontraŭuloj materialon por primokaj spritadoj. Ne forgesu, ke eble ankaŭ en via nacia lingvo "verda" estas sinonimo de "nematura", "stulta" aŭ simile.

7. *Adaptu la informadon al la medio !* Grava eraro estas paroli kaj skribi pri la Internacia Lingvo tute abstrakte, senkonsidere al la karaktero, al la intelekta kaj ĝenerale kultura nivelo de la publiko. Ankaŭ la persono de la parolanto tre gravas. Oni komprenu, ke al studentoj, ekzemple, plej trafe povas paroli studento aŭ profesoro, dum klera laboristo havos sendube la plej bonan sukceson en laborista medio.

8. *Ne tro emfazu pri la facileco de Esperanto !* Prefere oni akcentu la teruran malfacilecon de la naciaj lingvoj, eĉ de la propra gepatra (kiun oni kutime lernas dum minimume 8 jaroj kaj, ankaŭ kutime, post tiom longa lernado ne scias sufiĉe bone) kaj komparu la relativan facilecon de Esperanto kun ili. Cetere, antaŭ ol klarigadi la facilecon de Esperanto al aliaj, ni pruvu ĝin al ni mem per perfekta ekregio de la lingvo !

9. *Ĉiam parolu kaj skribu ankaŭ pri la kultura valoro de Esperanto !* Oni ne forgesu nian literaturon, la diversajn konkursojn (belartajn, oratorajn), la Internacian Someran Universitaton, la radioelsendojn kaj la aliajn kulturajn manifestaciojn en Esperanto kaj pere de ĝi.

10. *La digno de ĉiuj publikaj aranĝoj montru la respekton, kiun ni mem havas por Esperanto !*

Devizoj

ESTUS tre bone, se la aŭtuna kampanjo povus okazi en ĉiuj lokoj de la sama lando sub iu trafa komuna devizo. Ankoraŭ pli bone estus, se ni povus trovi tian devizon, kiu estus aplikebla en ĉiuj landoj. La kunveno de la reprezentantoj de informaj fakoj, kiu okazos dum la Universala Kongreso en Oslo, diskutos kaj decidos ankaŭ pri tiu ĉi afero.

La devizo devus esti simpla, klara, tuj komprenebla kaj imperativa. Ĉi sube estas donitaj kelkaj ideoj pri tia devizo :

- (1) Unu mondo—unu internacia lingvo.
Lernu Esperanton !
- (2) Kontribuu al konstruo de la mondo :
Lernu Esperanton !
- (3) Ju pli da personoj scias Esperanton,
des pli granda estas ĝia valoro.
Lernu la Internacian Lingvon !
- (4) La mondo bezonas la Internacian
Lingvon : hodiaŭ pli ol iam kaj
morgaŭ pli ol hodiaŭ.
Lernu Esperanton !
- (5) Lernu Esperanton—la Internacian
Lingvon de la moderna homo !
- (6) La tuta historia evoluo puŝas la
homaron al unueco. Plirapidigu
ĝin per lernado kaj aplikado de la
Internacia Lingvo Esperanto !
- (7) Antaŭkondiĉo de vera internacia
kompreniĝo estas komuna lingvo :
Lernu la Internacian Lingvon,
Esperanto !
- (8) Milionaj amasoj estas ankoraŭ mutaj
kaj surdaj ekster siaj nacioj—La
scio de Esperanto malfermas la
pordojn de la mondo !
- (9) La plej altaj intelektaj elitoj sentas
sin barbaroj en fremdaj lingvaj
medioj. Helpu al forigo de la
lingvaj baroj !
Lernu Esperanton !
- (10) La partopreno en la internacia vivo
ne plu estas privilegio de kelkaj,
sed rajto de ĉiuj. Realigu tiun
rajton : Lernu Esperanton !

Ekspozicioj

ANTAŬ kelkaj monatoj grandega, mondkonata foiro, disponigis al la landa asocio apartan budon en unu el la plej belaj pozicioj de la tuta ekspozicia spaco. Miloj kaj miloj da personoj ĉiutage pasis preter tiu loko. Multaj el ili rigardis la budon. Sed kion ili povis vidi?—Pli malbone ol nenion! Estis tie 3-4 malnovegaj afiŝoj, jam paliĝintaj, makulitaj; estis ankaŭ ne pli ol 2-3 sensignifaj libretoj; en unu angulo

troviĝis kelkaj polvaj gazetetoj el la epoko antaŭ la unua mondmilito; sur la muroj pendis kelkaj neinteresaj poŝtkartoj. Ĉio impresis tiel malbone, ke neniu, sed absolute neniu povus esti altirita al Esperanto, dum multegaj, eĉ tiuj kiuj eble havis simpatian por ĝi, estis malproksimigitaj, tre verŝajne por ĉiam.

La menciita ekspozicio estas klasika ekzemplo de laboro, kiu, kompreneble neintence, estas farata

Lernolibroj kaj vortaroj

(vidu p. 202, 2-a punkto)

Se oni ne havas pli grandajn, oni povas utiligi la ŝlosilojn (kiel en la apuda bildo): nuntempe estas haveblaj albana (2p.), angla (2p.), araba (6p.), ĉeĥa (2p.), dana (4p.), estona (3p.), finna (6p.), flandra (3p.), hispana (2p.), malaja (5p.), norvega (4p.), persa (3p.), sudafrika (1p.), sveda (5p.).

(Aldonu 10% por afr.)



Ekspozicio en Söderhamn, Svedujo (4000 vizitantoj).
Ni dankas pro la kliŝo al Eldona Societo, Stockholm.

kontraŭ Esperanto. Se iu malamiko de la Internacia Lingvo volus agi trafe kontraŭ nia afero, li ne povus trovi pli taŭgan rimedon ol aranĝi tiaspecan “ekspozicion” !

Bona ekspozicio devus en digna formo prezenti la ĉefajn atingaĵojn de Esperanto. La diversaj kampoj de nia aktiveco devas esti lerte kunigitaj kaj arte aranĝitaj, tiel ke la tuta ekspozicio donu almenaŭ palan bildon pri la ĉiuflanka—pure praktika, kultura kaj ideologia—valoro de nia lingvo.

Jen la ĉefaj branĉoj, kiujn laŭ ebleco, devus havi tia ekspozicio por la ĝenerala publiko :

1. *Mapo de la mondo* sur kiu estos signitaj la lokoj, en kiuj troviĝas Esperanto-grupo kaj delegitoj. Klariga teksto donu informon pri la signifo de diversaj signoj, pri la rolo de la delegita reto de U.E.A.

2. *Lernolibroj kaj vortaroj* ĝenerale, sed aparte por la lingvo(j) de la koncerna lando. Laŭ ebleco organizi

tuj ankaŭ la disvendadon de lernolibroj.

3. *Verkaro de Zamenhof*.

4. *Traduka literaturo* : ekspozicii nur la plej valorajn verkojn de nia traduka literaturo ; ne forgesi la antologiojn ; apartan atenton dediĉi al la tradukoj el la nacia lingvo de la lando ; montri aŭ almenaŭ mencii la rolon de Esperanto kiel “pontolingvo” (ekzemple tradukoj de orienteŭropaj literaturoj en la ĉinan lingvon el Esperanto).

5. *Literaturo originala* kun la mencio pri la eventualaj tradukoj el Esperanto en diversajn naciajn lingvojn.

6. *Gazetaro* : elekti la plej valorajn kaj belaspektajn numerojn de niaj plej bonaj revuoj kaj gazetoj. Se oni ekspozicias ne plu aperantajn revuojn, tiam nepre elekti nur kompletojn de la plej valoraj (ekzemple la Revuo, Literatura Mondo k.s.)

7. *Turismo kaj komerco* : ekspozicii freŝdatajn gvidlibrojn, gvidfoliojn, prospektojn kaj afiŝojn.

Inter gvidfolioj, k.t.p., aperintaj dum la lastaj monatoj, estas :—
(vidu ankaŭ p. 209—sed legu la leteron sur p. 217)

La Hungara Provinco	..	IBUSZ, Hungara Informa Kontoro por Fremdultrafiko, Lenin-körut 67, Budapeŝt VII, Hungarujo.
Itala Turisma Klubo	..	Touring Club Italiano, Corso Itala 10, Milano, Italujo.
Lago de Como	..	Ente Provinciale per il Turismo, Como, Italujo.
Thiers	..	Syndicat d'Initiatives, Thiers (Puy-de-Dôme), Francujo.
Bonn	..	Verkehrsamt Bonn, Poststrasse 27/29, Bonn, Germanujo.
Volo kaj Vojo de Saarlando	..	Informationsamt der Regierung des Saarlandes, Schillerstrasse, Saarbrücken, Sarlando.
Bamberg	..	Städt. Verkehrsamt, Rathaus, Bamberg, Germanujo.
Nürnberg	..	Verkehrsverein Nürnberg R.V., Lorenzer str. 31/III, Nürnberg, Germanujo.
Bratislava	..	Slovakatour, Reduta, Bratislava, Ĉeĥoslovakujo.
Nancy	..	Syndicat d'Initiatives, 57 rue Saint-Jean, Nancy, Francujo.
Aflenz	..	Esperanto-servo, S-ro P. Angerer, Aflenz-Kurort (Stirio), Aŭstrujo.
Brugge	..	Stedelijke Dienst voor Toerisme, 16 Dijver, Brugge, Belgujo.

8. *Radio*: prezenti—eble eĉ per trafa desegnaĵo—la Esperantajn disaŭdigojn montrante ankaŭ, se iel eble, kelkajn programojn. En 1951 entute 15 radiostacioj el 10 landoj elsendis 1053 programojn en Esperanto.

9. *Fotografiaĵoj* de kongresoj, internaciaj kursoj, Internacia Somera Universitato, internaciaj vojaĝoj k.s.

10. *Internacia korespondado*.

Kompreneble, oni povus aldoni ankaŭ aliajn branĉojn aŭ kunligi

kelkajn el la supraj. Se la loko ne permesas havi grandan ekspozicion, oni povas preni nur kelkajn el la supraj branĉoj. Aranĝante ekspozicion en iu aparta medio (ekzemple universitato, komerca ĉambro, filatelie societo), oni, kompreneble, akcentu ĝuste tion, kio interesas la koncernan medion.

Ĉiu ekspozicio nepre indiku la lokon, kie la interesigantoj povas ricevi pliajn informojn pri Esperanto.

dekstre :

Ekspozicio en Esbjerg,
Danlando.

(7000 vizitantoj).

*Ni dankas pro la kliŝo
al Dansk Esperanto-Blad.*

Notu ke estas bona fotografiaĵo de Universala Kongreso: krome, gvidfolioj, gazetoj, belaspektaj kaj bonaj libroj, k.t.p.



Afiŝoj

BONA afiŝo devas ne nur atentigi pri la ekzisto de Esperanto, sed ankaŭ altiri al nia afero tiujn, kiuj ĝin rimarkos. Tial ĝi devas trafi la esencan signifon ne nur praktikan, sed, laŭ ebleco, ankaŭ idean de nia lingvo.

Sur la kovrilpaĝo estas reproduktita tia afiŝo. Ni trovas ĝin tre trafa. La afiŝo estis eldonita de la tre agema klubo en Brno (Ĉeĥoslovakujo) en la jaro 1951. La teksto estas: “Esperanto ligas vin kun la tuta mondo; (en la malsupra angulo) Lingvo facila kaj preciza, moderna kaj vivanta, disvastigita tra la tuta mondo, kun riĉa literaturo, kaj perfekta organizo de praktikaj servoj”; fine troviĝas la adreso de la klubo. Ni atentigas, ke la afiŝo estas plurkolora: la globo estas verdeta, la flagoj en la respektivaj koloroj, la simbolo de radio-stacio nigra, dum la teksto mem

estas ruĝa kaj nigra. Eble oni povos utiligi la ideon de la afiŝo, kun la sama aŭ simila teksto, ankaŭ en aliaj landoj.

Konsiderante la relative altan prezon de multkoloraj afiŝoj, ni opinias, ke ĝi devus esti eldonita en kelkaj miloj da ekzempleroj, por ke tiamaniere la prezo de ĉiu unuopa afiŝo malaltiĝu. Tion povas plej bone fari la landaj asocioj, de kiuj la grupoj povus ĝin aĉeti je la efektivaj preskostoj. Estas necese lasi sur la afiŝo liberan lokon, kie ĉiu grupo povos presigi sian propran adreson.

Se la afiŝo estas bele presita kaj se ĝi ne havas tro grandan formaton, oni povas facile ĝin meti en vitrinojn de butikoj, en kafejojn kaj restoraciojn, en atendejojn de teatroj, stacidomoj kaj aliaj publikaj lokoj laŭ la cirkonstancoj de la lando.

Flugfolioj

ANKAŬ la enhavon de laflugfolioj—kiel, cetere, de ĉiuj aliaj rimedoj de informado—oni devas adapti al la medio. Tial estas necese bone ĝin studi por ne maltrafi la celon.

Du ideoj pri enhavo de flugfolio ŝajnas al ni aplikeblaj en ĉiuj landoj:

1. *Opinioj pri Esperanto* — Kvankam ni prefere agas per la aŭtoritato de la argumento ol per la argumento de la aŭtoritato, tamen oni povas bone eluzi ankaŭ eldirojn pri Esperanto de famaj personoj aŭ gravaj institucioj. En la flugfolio oni povas taŭge vicigi plurajn tiajn opiniojn, kiuj emfazas la diversajn aspektojn de la demando kaj, en sia

tuteco, reliefigas la gravecon de nia afero. Jen, nur kiel ekzemplo, skemo de tia flugfolio:

“La diverseco de la lingvoj estas unu el la plej grandaj malfeliĉoj de la homaro.”—Voltaire.

“Por ke la popoloj interkompreniĝu, estas necese ke ili unue kompreniĝu.”—Romain Rolland, Nobelpremiito, 1916.

“Mi estas konvinkita, ke la ĝeneraligo de la uzo de Esperanto povus havi la plej feliĉajn konsekvencojn por la internaciaj rilatoj kaj por la efektivigo de universala paco.”—Louis Lumière, Membro de la Franca Académie des Sciences.

“La oferoj, kiujn faros kiu ajn homo de nia eŭropa mondo, dediĉante iom da tempo al lernado de Esperanto, estas tiel malgrandaj, kaj la rezultoj, kiuj povas el tio sekvi, tiel grandegaj, ke oni ne povas rifuzi fari tiun provon.”—Leono Tolstoj.

“La enkonduko de Esperanto en la internaciajn rilatojn havus grandegajn konsekvencojn el vidpunkto de la progreso de la scienco kaj de ĝia aplikado.”—El Rezolucio de 40 membroj de la Franca Académie des Sciences, 1924.

“La subskribintoj agnoskas, ke la enkonduko de Esperanto kiel komuna lingvo por publikigo de sciencaj laboroj estas tre efika rimedo por plisolidarigo de la internacia kunlaborado de la sciencistoj.”—El Rezolucio de 85 japanaj sciencistoj, 1950.

“Mi donas grandan signifon al la disvastigo de Esperanto eĉ el vidpunkto politika. Dank’ al ĝia facileco, ĝi taŭgas tre bone por la rapida disvastigo de la propagando favore al la paco kaj por la plilarĝigo de la intelektaj kaj komercaj rilatoj inter eĉ la plej malproksimaj popoloj.”—F. Nitti, verkisto kaj eksprezidanto de la Itala registaro.

“Estas necesaj multaj jaroj por ellerni nur legi la anglan aŭ la francan, la germanan aŭ la rusan, sed persono havanta nur mezan instruitecon povas kompreni Esperanton post 3 aŭ 4 semajnoj.”—Upton Sinclair, fama usona verkisto.

“Ĉia teoria diskuto estas vana. Esperanto ekfunkciis . . . La praktika neceseco de internacia lingvo estas evidenta.”—Charles Meillet, membro de la Franca Instituto, profesoro en Collège de France.

La suprajn aŭ similajn trafajn opiniojn oni povas bone utiligi ankaŭ kiel motojn por artikoloj. Oni povus eventuale eldoni poŝtkarton kun la foto de la koncerna persono kaj kun lia eldiro pri Esperanto.

2. *Kompleta gramatiko*.—La grandega simpleco de la gramatiko de nia lingvo ebligas la presigon de la tuta gramatiko sur unu folieto. Tion oni povas fari ankaŭ sur poŝtkarto. Se la flugfolio estas sufiĉe granda, oni povas presigi sur unu flanko la gramatikon kaj sur la alia malgrandan vortareton, konsistantan el la plej kutimaj vortoj. Al tia flugfolio oni povas aldoni opinion de fama persono, ekzemple tiun de Upton Sinclair, pri la relativa facileco de Esperanto.

Sur ĉiu flugfolio nepre devas troviĝi indiko pri la loko, kie oni povas ricevi pli detalajn informojn. Kombinitaj kun la aliaj formoj de informado, la flugfolioj, bone distribuitaj, povas multe kontribui al diskonigo de la Internacia Lingvo.

daŭrigo (de p. 206)

institucioj, al kiuj ĝi regule sendas dokumentojn pri la Internacia Lingvo. Tiel, ĝi ricevis dankojn kaj petojn pri alsendo de pliaj ekzempleroj fare de UNESKO, de la Informa Departamento de Unuiĝintaj Nacioj, de Internacia Popola Kolegio (Londono), de la Monda Konsilantaro por la Asambleo de Popoloj (Parizo), de la Nederlanda Ministro pri Edukado, de la Sudafrika Ministro pri Edukado, de pluraj universitatoj kaj kolegioj.

La Aprila numero de la “Bulletin NGO-ONG” (Bulteno de la Ne-registaraj Organizaĵoj), la granda organo de la Unuiĝo de Internaciaj

Asocioj, publikigis en du lokoj informojn pri la Centro de Esploroj kaj Dokumentado de UEA. Unu informo raportas pri fondiĝo de CED kaj ĝiaj celoj, dum la alia mallonge prezentas la ĝis tiam aperintajn dokumentojn de CED.

Novaj donacoj al la CED :

	£	ŝ.	p.
Donacite ĝis la 10-a de Majo ..	186	16	6
Sveda Esperanto-Federacio ..	34	0	0
F. R. Carlson, Kanado ..		7	0
D-ro F. J. Williams ..		10	0
Brita Esperantista Asocio ..	25	0	0
Inĝ. A. Mijhuis ..	2	0	0

Sume la 5-an de Junio £248 13 6



Centro de Esploroj kaj Dokumentado
300, West End Lane, London, N.W.6, Anglujo

El la Aktiveco de CED

Esperanto-eldonaĵoj inter 1945 kaj Marto 1952

La kunlaboranto de CED W. Auld ĵus finis tre gravan laboron: la bibliografion de ĉiuj Esperanto-eldonaĵoj, publikigitaj inter la jaro 1945 kaj Marto 1952. La rezulto de lia plurmonata intensa kaj tre konsciencia laborado estas prezentita en studo de 24 dense tajpitaj paĝoj. Jen tute mallonga resumo, kiu certe interesos ĉiujn esperantistojn:

En la menciita periodo estis entute publikigitaj 475 diversaj eldonaĵoj. El tio estis: 8 aŭtobiografioj, 10 belartaj verkoj, 13 biografioj, 6 dramoj, 50 fikciaj verkoj, 8 diversaĵoj, 28 verkoj pri la Esperanto-Movado, 2 pri filatelio, 12 geografio kaj vojaĝoj, 11 gvidlibroj, 4 historiaj verkoj, 4 verkoj pri humuro, 15 kantolibroj, 3 legolibroj, 51 lernolibroj, 9 verkoj pri lingvistiko, 12 libroj da poeziaĵoj, 34 nacilingvaj verkoj pri la Internacia Lingvo, 41 verkoj pri filozofio kaj religio, 14 sciencaj verkoj, 36 sociologiaj kaj politikaj verkoj, 3 libroj pri stenografio, 16 vortaroj, 85 turismaj kaj aliaj prospektoj.

S-ro Auld daŭrigas tiun gravan laboron kaj ĉiujare la listo estos kompletigita.

Artikolo de Profesoro Privat en 13 gazetoj

La kunlaboranto de CED, Prof. D-ro E. Privat, verkis artikolon pri D-ro Zamenhof okaze de lia mortotago. Tiu artikolo, tradukita en la naciajn lingvojn, aperis en Aprilo ĉijara en 1 belga, 1 nederlanda kaj

11 italaj gazetoj kaj revuoj. La tradukojn kaj aperigon prizorgis la kunlaborantoj de CED D-ro Kempeneers, Prof. Conterno, F-ino Vermaas kaj S-ro Fighiera.

Surbaze de materialo sendita de CED, ĝia kunlaboranto D-ro I. Borovečki aperigis en la plej granda kroata gazeto artikolon pri D-ro Zamenhof.

Kelkaj aktualaj studoj

Diversaj kunlaborantoj de la Centro akceptis la taskon prilabori apartajn aspektojn de la problemoj de komuna lingvo. Jam estas finitaj jenaj ampleksaj studoj:

D-do F. Makkink : La lingvo de unuiginta Eŭropo

D-do F. Makkink : La lingva problemoj en biologio kaj en kelkaj parencaj sciencoj

F. Moravec : Esperanto ĉe la infanoj

D-ro S. Ziegler : Esperanto kaj Esperantologio


D-ro S. Ziegler : La lingvistika valoro de Esperanto

Prof. I. Lapenna : La signifo de Esperanto por progresigo de la scienco

La rezultoj de tiuj studoj estas vaste utiligataj por kunmeto de dokumentoj, kiujn la CED sendas dufoje en la monato al UNO, UNESKO kaj ĉirkaŭ 100 aliaj gravaj internaciaj organizaĵoj kaj institucioj.

Eĥoj pri la aktiveco de CED

La CED ricevis plurajn dank-esprimojn de diversaj organizaĵoj kaj
daŭrigo sur p. 205



Radio kaj Esperanto

Ĉiujn informojn pri radio sendu al S-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, PARIS 16, Francujo.

En la tabelo horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa tempo oni aldonu unu horon.

Por somera tempo oni aldonu laŭ neceso — kutime 1 horon.

Mallongigoj : I=Informoj, P=Parolado, K=Kurso, M=Muziko

Lundo	18.00–18.30	Rabat. 482m. K (franclingve). Radio-Maroc, Rabat, Maroko.
	22.15–22.40	Hilversum, 402m. kaj 188m. I.M. (ĉiun duan lundon) : V.A.R.A. Heuvellaan 33, Hilversum, Nederlando.
Mardo	00.45–01.00	Bauru. 91m., 240m. K. I. Radio Bauru, Brazilo.
	07.45–08.00	Lille. 235m. K. I. Esperanto, 94 rue de la Rochelle, Tourcoing, (Nord), Francujo.
	11.55–12.00	Bern. 48.66m., 31.46m., 16.87m. P. D-ro Baur. SRG, Kurzwellendienst, Neuengasse 23, Bern.
	15.00–15.15	Wien. 203m., 25m., 30m., 41m., 48m. P. (ĉiun duan mardon).
	17.35–17.40	Bern. 48.66m., 31.46m., 19.60m. P. D-ro Baur.
	22.15–22.30	Gvatemalo. 49m. I. La Voz de Centro América, Guatemala C.d., C. Ameriko.
Merkredo	15.45–16.00	Graz. 417.2m. K. (ĉiun duan merkredon) Radio Graz, Aŭstrujo.
	18.00–18.20	Roma. 25.21m., 31.35m., 49.92m. P. Radio Roma—Esperanto, Via Vittorio Veneto 56.
	19.30–20.00	Madrid. 225m., 42.33m. P. Radio S.E.U., Sección Esperanto, Diego de León 49, Madrid, Hispanujo.
	21.35–21.40	Wien. 513m., 25.46m., 48.74m. I. Radio Wien, Argentinierstr. 30a, Wien IV. Aŭstrujo.
Jaŭdo	08.30–08.45	Paris. 348m. K. Esperanto-Office, Orléans (Loiret), Francujo.
	11.55–12.00	Bern. Kiel marde. P. D-ro Privat.
	17.35–17.40	Bern. Kiel marde. P. D-ro Privat.
Vendredo	18.00–18.20	Roma. Kiel merkrede.
	22.15–22.30	Hilversum. 298m. P. (vidu sube). N.C.R.V. Schuttersweg 8, Hilversum, Nederlando.
	22.30–23.00	Hilversum. Kiel lunde, sed ĉiusemajne. M.
Sabato	08.30–09.00	Rio de Janeiro. 375m., 30.71m. K. I. Radio Ministério da Educação, Rio de Janeiro, (DF) Brazilo.
	22.15–22.20	Hilversum. 298m. P. K.R.O., Emmastraat 52, Hilversum, Nederlando

Hilversum (N.C.R.V.) : Jen la programo prezentota de Kristana Unuiĝo de Nederlandaj Esperantistoj :

11 julio : Ke oni devas ĉiam preĝi (S-ro H. A. de Hoog)


8 aŭgusto : Pelado al feliĉo (F-ino E. Wolzak)

5 septembro : *temo ankoraŭ ne konata* (S-ro R. V. Spronsen)

Radio Roma : *en julio* : 11, La Kristaneco : Sankta Jeronimo ; 16, Fabelo el Germanujo ; 18, Itala literaturo : Luigi Pulci ; 23, por geknaboj, *Pinokjo* ; 25, La Kristaneco : Sankta Aŭgusteno ; 30, la itala urbo Bèrgamo.

en aŭgusto : 1, Respondoj al geaŭskultantoj ; 6, Turismo : Revo en Verona ; 8, La Kristaneco : Sankta Benedikto ; 13, Italaj komponistoj : Monteverdi kaj la Venecia skolo ; 15, Itala literaturo : Matteo Maria Bojardo ; 20, Fabeloj el Hungarujo ; 22, La Kristaneco : Sankta Gregoro la Granda ; 27, por geknaboj, *Pinokjo* ; 29, Rekonstruado en Sicilio *aŭ* Intervjuo pri la 37-a U.K. en Oslo.

en septembro : 3, la urbo de Etna ; 5, Respondoj al la geaŭskultantaro ; 10, Itala komponisto : Francesco Cilèa ; 12, La Kristaneco : Sankta Bonaventuro.



Tra la Libraro

Duope ricevitaĵn verkojn ni recenzas ;
unuope ricevas nur mencion.

*=akireblaj ĉe U.E.A.

Recenzoj enhavas la proprajn opiniojn de la recenzintoj.

Ili ne necese estas laŭ la oficiala starpunkto de U.E.A.

***Rui Barbosa** de Fernando Nery, el la portugala lingvo tradukis Jozefo Joels. Eldonis Casa de Rui Barbosa, Rio de Janeiro, Brazilo. 292 paĝoj 24 × 15.5 cm. Prezo 21ŝil., afranko 1 ŝil.

Jen libro pri unu el la plej eminentaj filoj de Brazilo, verkita originale en la portugala lingvo de entuziasma disĉiplo, kaj tradukita en belan kaj fluan Esperanton de kompetenta Esperantisto.

Filo de medicina doktoro, Rui Barbosa studis ĉe la jura fakultato. Baldaŭ evidentiĝis, ke liaj talentoj tiel abundas, ke ne estas eble limigi ilin nur al la jura kampo. Kiel oratoro, advokato, beletristo kaj politikisto Rui Barbosa estis elstara homo, kaj fariĝis batalanto kontraŭ ĉia maljusto kaj ĉia perforto. Li estis forta advokato por la abolicio de la sklaveco, por la libereco de la gazetaro, kaj por la vera demokratio, en kiu la landaj instancoj efektive esprimus kaj plenumus la volon de la nacio.

Dum la vivperiodo de Rui Barbosa, Brazilo evoluis de reĝlando al respubliko, sed la nova reĝimo, pro sia nedemokrata sinteno, ne alportis internan trankvilon al la brazila popolo. Jen ŝtorma politika tempo en la historio de Brazilo, sed unu viro, Rui Barbosa, super ĉiuj aliaj, elstaris kiel la nelacigebla batalanto por la popolo kontraŭ ĉia maljusteco. Tiu ĉi parto de la libro estas treege

interesa, kaj estas kvazaŭ spegulo per kiu oni observas la politikan vizaĝon de tiuj tagoj.

Post unujara ekzilo en Eŭropo, Barbosa revenis al sia patrolando, kaj, fine, liaj samlandanoj ekkomprenis kaj alte taksis la veran karakteron de ĉi tiu brila homo. En la eksterlando, ĉefe en Eŭropo, lia batalo por demokratio kaj justeco estis rekonata. Li estris la brazilan delegacion ĉe la dua Packonferenco en Hago, en la jaro 1907, en kiu partoprenis 48 nacioj. La bonekonata angla gazetisto, W. T. Stead,* raportis pri Rui Barbosa ĉe la Konferenco, *Estante ĉiam modesta, ĉiam humila, neniam sinmontrema—li superstaris la delegitaron, kaj infuis la Konferencon per la nura forto de sia talento kaj de sia karaktero*. Proksiman jaron, 1908, oni elektis lin membro de la Konstanta Arbitracia Kortumo en Hago.

En 1918 oni solenis en Brazilo la jubileon de la patriota agado de ĉi tiu granda apostolo de la justeco, post 50 jaroj de lia partopreno en la politika vivo de la lando, dum kiuj li senĉese kaj sentime defendadis la rajtojn de la civitanoj. La vivo de tia homo havas valoron ne nur por Brazilo sed por la tuta mondo—speciale por la moderna mondo kun ĝia insida perforto kaj stulta politiko.

* Certe novaj Esperantistoj interesos sciiĝi ke W. T. Stead estis unu el la Esperantistaj pioniroj en Anglujo kaj eldonis lernolibrojn, k.t.p.—*Rim. Red.*

En 1923 forpasis la eminenta kaj multamata filo de Brazilo, postlasante al sia lando kaj al la mondo belan memoron pri plej sincera vivo.

Kelkaj prezeraroj estas jam listigitaj je la fina paĝo de la libro. Restas nur kelkaj vortoj kaj frazoj plibonigeblaj, ekz. *unun* (unu), *dislaso* (ĉu disigo aŭ prorogo?) *de la Parlamento, Britujo* (Brita) *Legacio, responduma* (pli ofte, respondeca), *Stracoberry Aill* (verŝajne vilaĝo Strawberry Hill), kaj *Kess Garden* (Kew Gardens). La traduko estas bonega, la presado klara, sed tia bela libro indas pli bonajn kovrilojn. Entute, verko nepre leginda pri vivo vere inspira, kaj homo ĉiam nobla.

D. Kennedy.

***Curso Prático de Esperanto** de D-ro F. Szilágyi, adaptita por portugallingvanoj de Ismael Gomes Braga. 100 paĝoj 18 × 12.5 cm. Eldonita de The Esperanto Publishing Co. Ltd., Anglujo; prezo 3 ŝil., aŭfranko 2p.

Antaŭ pli ol tridek jaroj ni ekpaŝis en la vojon de Esperanto helpe de efika lernolibro *Primeiras Lições de Esperanto*, verkita de nia karmemorasano Th. Cart kaj tradukita de s-ano A. Caetano Coutinho, pioniro de nia movado en Brazilo. Eldono de Hachette et Cie., el Parizo, tiu libreto tre plaĉis al ni pro la internacia karaktero kaj eĉ pro kompostado kaj eksteraĵo ne similaj al portugallaj eldonoj. *Hejmaj sanktuloj ne okazigas miraklojn*, oni diras ĉe ni.

Eble pro tiuj samaj sentoj, ni ĝoje salutas la aperon de ĵus eldonita broŝureto *Curso Prático de Esperanto*, verko de nia talenta s-ano D-ro Ferenc Szilágyi, adaptita al la uzado de la popoloj portugallingvaj de nia tre kara amiko Ismael Gomes Braga (se li permesas, ke ni enviciĝu en tiu nombro). Eldono de The Esperanto

Publishing Co. Ltd., Anglujo, jen verketo, kiu ankaŭ resumas internacian kooperadon strebanta al diskonigo kaj instruo pri la Internacia Lingvo, do alloga al niaj sentoj pri translima amikeco.

Malgraŭ la nuancoj, kiuj karakterizas la portugalan lingvon en Brazilo, la portugala teksto estas modela kaj laŭdinda. Rekta metodo, kiu amuzas nin pere de bonhumoraj bildoj frapantaj nian menson kaj helpantaj la komprenon de la enhavo, eĉ se la lernanto estas timigita de la unuaj paĝoj, kie oni postulas de li la tujan kontakton kun la lingvo (evitante la didaktitan aspekton tiel enuigan)—ni kredas, ke tiu verketo tre efikos por la instruado de Esperanto inter niaj samlandanoj, same kiel inter tiuj de nia kara Brazilo, dua patrujo de la portugaloj. Rekomendante la akiron de tiu libro al niaj amikoj, ni kredas sincere, ke ili gratulos, kiel ni, la eldonantojn de tiu *Curso* kaj sukcesos varbi novajn adeptojn por nia movado. Tiel estu.

J. Antunes.

Ricevitaj (petante skribu nur en Esperanto kaj atentu la leteron sur p. 217).

Bonvenon al Trondheim: plurkolora ilustrita faldfolio, kun mapo montranta kiel atingi Norvegujon. Petu ĉe Reisetrafikkforeningen for Trondheim og Trøndelag, Trondheim, Norvegujo.

Aŭto-Pramŝipo: ilustrita faldfolio kun informoj pri prezoj kaj kondiĉoj de la pramŝipoj inter Frederikstad—Larvik—Frederikshavn. Petu ĉe A. S. Larvik-Frederikshavnferjen, Poŝtboks 2443, Oslo, Norvegujo.

Hamburg, Germanujo: ilustrita grandformata faldfolio, kun plurkolora kovrilo: vere bone presita. Petu ĉe Fremdenverkehrsverein der Hansestadt Hamburg e.V., Lombardsbrücke 1, (24a) Hamburg 1, Germanujo.

daŭrigo sur p. 210



Oslo Vokas Vin!

Adreso : Boks 942, Oslo, Norvegujo.

Bankokonto : Nen Norske Creditbank No. 6099 B/179.

Poŝtgirokonto : 153. 85.

Kongresa Libro : La libro kun la tuta programo kaj multaj informoj kune kun avizo pri loĝejo kaj aliaj dokumentoj estas sendita al ĉiu aliĝinto. Kiu ne ricevis sian ekzempleron tuj sciigu L.K.K.

Lasta dato : Ni atentigas, ke aliĝojn la L.K.K. ne akceptas post fino de junio. L.K.K. ankaŭ ne garantias plenumon de mendoj—ĉu por loĝejoj ĉu ekskursoj—post tiu tempo.

Statistiko : (ĝis fino de majo)
 Argentino 1, Aŭstralio 2, Aŭstrujo 10, Belgujo 20, Brazilo 4, Britujo 204, Danujo 62, Ebura Bordo 2, Finnulo 65, Francujo 120, Germanujo 87, Hispanujo 2, Indonezio 1, Irlando 1, Italujo 54, Izraelo 2, Japanujo 1, Jugoslavujo 6, Kanado 1, Kenjo 2, Nederlando 59, Norvegujo 263, Novzelando 1, Polujo 2, Portugalujo 1, Sudafriko 2, Svedujo 262, Svislando 14, Turkujo 1, Urugvajo 1, Usono 5. Sume 1258 el 31 landoj.

Mason Stuttard, K.K.S.

Premio de la Londona Klubo por la Belarta Konkurso : Okaze de sia 50-jara Jubileo la Londona Esperanto-Klubo donis premion £5 por la Belarta Konkurso en Oslo. Aliaj

personoj aŭ societoj kiuj deziras premii al la Belarta aŭ Oratora Konkursoj anoncu sin al L.K.K.

La Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj okazigos 2 publikajn kunvenojn dum la 37a U.K.

Laŭ la kutimo starigita en la komenco de la trijara vivo de I.L.E.I. la unua kunveno pritraktos aktualajn aferojn :—la laboro de I.L.E.I. por la disvastigo kaj praktiko de Esperanto; diversaj proponoj senditaj de reprezentantoj de la Ligo, ekzemple, internaciaj lernejoj; interrilatigo de seminarianoj Esperantistaj; Esperanto en internaciaj asocioj de instruistoj, k.t.p.

La dua kunveno pritraktos pedagogian temon pere de Esperanto. Tiun ĉi jaron, oni diskutos “La Puno en la Lernejo : kial oni punas ; kiel ; ĉu korpa puno estas permesata ?” Diverslandaj vidpunktoj pri tiu ĉi grava afero estas atendataj. Se iu instruisto lerneja volas paroli la aranĝoj estos multe helpataj, se li aŭ ŝi tuj skribos al la Prezidentino de I.L.E.I. F-ino V. C. Nixon, B.A., 183, Woodlands Park Road, Birmingham, 30, Anglujo.

daŭrigo (de p. 209)

Foiro de Padova : grandformata, tri-kolora afiŝo por reklami la Foiron je 7-22 junio 1952. Bedaŭrinde ĝi venis tro malfrue por esti anoncita sufiĉe frue por utili al la

nunjara Foiro. Petu ĉe Fiera di Padova, Via N. Tommaseo 59, Padova, Italujo (oni povas ankaŭ peti esti notita por informoj pri la venontjara foiro).

daŭrigo sur p. 224



Tra la Mondo Esperantista



Aŭstrujo

Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno. Nelacigebla Hofrat Steiner en Vieno metis la fundamenton de la I.E.M.W. troviĝanta en la Imperiestra Kastelo (Hofburg) antaŭ 25 jaroj. Okazos je la 15-a de Aŭgusto nunjare ceremonio kaj kun ĝi la inaŭguro de konstanta ekspozicio de interesaj eroj de nia movado, libroj, dokumentoj, bildoj. La Muzeo ne estas nur kolekto laŭ biblioteka maniero, sed elmonro en taŭge aranĝitaj mebloj de vidindaj objektoj.

Zamenhof-monumento en Wörgl. Je la 27-a de Julio nunjare okazas la inaŭguro de la Monumento honore al D-ro Zamenhof en la tirola urbo Wörgl. Riĉa programo kompilita de la lokaj samideanoj agrable enkadrigas la ceremonion de la inaŭguro sub protekto de la Federacia kanceliero D-ro Figl kaj de eminentaj personoj el la nacia vivo aŭstra. Kompletajn informojn sendos laŭ demando S-ro Hans Steiner, Augasse 42, WÖRGL, Tirol, Aŭstrujo.

Belgujo

Reĝa Belga Ligo Esperantista. Bonvolu noti la novan adreson, kiu jam validas: Rue Général Lotz 106, UCCLE-BRUXELLES. (Ĝi estas ankaŭ la adreso de D-ro P. Kempeneers, Vic-Prezidanto de U.E.A.)

La 36-a Belga Kongreso okazis en Bruĝo je 31 Majo–2 Junio. Partoprenis ĝin 110 samideanoj: inter ili 4 fremdlandanoj. Okazis laborkunsido

(temo: *Esperanto kaj Turismo*), oratora konkurso por junuloj, katolika diservo, bonvenigo flanke de la urbestro (kiu invitis ilin kunsidi en salonego de la Urbdomo). Dimanĉe oni festis la 50-an datrevenon de la fondiĝo de la Bruĝa Grupo Esperantista, kaj vespere okazis teatra vespero, pieda promenado kaj motorboata ekskurso sur la lumigataj kanaletoj. Oni finis la kongreson per tuttaga ekskurso aŭtomobila laŭlonge de la marbordo, de la nederlanda landlimo ĝis la franca.

Brazilo

Grava nova libro en Esperanto. La *Casa de Rui Barbosa* (Domo de Rui Barbosa) estas institucio de la Ministerio de la Edukado kaj Sano de Brazilo, samtempe biblioteko kaj muzeo kiu funkcias en la domo, kie dum multaj jaroj vivis la fama brazila juristo kaj ŝtatisto Rui Barbosa. Por memorigi la centan datrevenon de tiu eminenta brazilano, la *Casa de Rui Barbosa* eldonis grandan serion da verkoj de li kaj pri li. Tiu verkaro enhavas nun imponan libron en Esperanto: *Rui Barbosa—Biografia Eseo*, verkita de Fernando Nery kaj tradukita de Jozefo Joels. La libro estis solene prezentita al granda ĉeestantaro en kunsido de la Brazila Esperanto-Ligo, kiun prezidis D-ro Américo Jacobina Lacombe, Direktoro de la *Casa de Rui Barbosa* kaj Profesoro en la Katolika Universitato de Rio de Janeiro. Parolis dum la kunsido: D-ro Miguel Timponi, iama

Sekretario (Ministro) de Internaj Aferoj kaj Sekureco de la Federacia Distrikto kaj Vicprezidanto de Brazila Klubo Esperanta ; la tradukinto ; kaj D-ro Lacombe. Ĉeestis ankaŭ D-ro Carlos Domingues, Prezidanto de la Brazila Esperanto-Ligo, pro kies klopodoj aperis la grava libro (vidu recenzon sur p. 208).

Britujo

La 36-a Brita Kongreso de Esperanto okazis en Newcastle-upon-Tyne dum Pentekosto, kaj ĉeestis 200 gesamideanoj. Inter la Patronoj estis la Lorda Urbestro de Newcastle (S-ino Altkonsilantino V. H. Grantham)*, Lordo Lawson de Beamish, dek Parlamentanoj kaj aliaj eminentuloj. Tre impona estis la Civita Akcepto de la Urbestra Moŝto en la Laing Artgalerio.

En la Jarkunveno de la Brita Esperantista Asocio la membroj akceptis kun aprobo la raporton de la Konsilantaro, reelektis la Prezidanton (S-ron W. A. Gething), la Honorajn Oficistojn kaj (kun du ŝanĝoj) la Komitatanojn. Ili ankaŭ favore voĉdonis por iom pli altaj kotizoj en 1953. Komunaj manĝoj ĉe la Kongresejo elvokis plej varman familian senton, kaj la Balo estis vere gaja afero. Fakkunvenoj, Diservo kaj ekskursoj bonege sukcesis, kaj ĉiu Kongresano ĝuis veran feston. Entute, brila Kongreso, danke al S-roj Fairbairn, Neil kaj Sutcliffe (Prezidanto, Hon. Sekretario kaj Kasisto) kaj al la membroj de la tre kompetenta L.K.K.

*S-ino Grantham estas la unua virina Lorda Urbestro de Newcastle. Ĉar oni kutime donas al la edzino de Lorda Urbestro la honortitolon (sen vera signifo) 'Lordina Urbeŝtrino', oni anglalingve ĉiam nomas S-inon Grantham 'Lorda Urbestro', kvankam ŝi estas virino, por indiki ke ŝi ja estas ofiĉavanto, ne nur ties edzino. Ni simile faris : ĉu prave ?

Londona Kooperativa Societo. La Publik-Interrilata Fako, kiu akiris famon pro sia uzado de Esperanto por la propra reklamado ĉe la Londonaj Subteraj Stacidomoj (Vidu p. 253, *Esperanto*, Okt. 1951) lastatempe gajnis, el 465 konkursintaj kooperativaj societoj en Grand-Britujo, la plej deziratan premion de la kooperativa movado, pro publikaj interrilatoj kaj reklamado. Estas memkompreneble, ke personoj kun tiaj progresemaĵoj ideoj estas superaj en ĉiu fako de sia metio, kaj ni povas gratuli al la Ĉefestro de la P. I. Fako, S-ro H. Axson, kaj al liaj helpantoj.

Ĉeĥoslovakujo

Regiona Kunveno en Brno estas anoncita okazi je la 8-a de Junio, kun tre impona programo por Teatra Vespero. Raporto sekvos.

Francujo

La 'Franca Movado pri Abundeco' (Le Mouvement Français de l'Abondance) vigla grupo ekonomia kaj socialista, kiu havas tutmondajn branĉojn kaj kiu estigis la doktrinon de 'Disdona Ekonomio' enhavas multajn fervorajn esperantistajn adeptojn, laŭ informo de samideanino de la grupo en Bourg-la-Reine, kiu antaŭnelonge vizitis la Centron de tiu Movado. Ŝi konstatis, ke la lernado de Esperanto estas tie tre instigata kaj konsilata al ĉiuj aliĝintoj.

Blinduloj. La ĵurnalo *Le Figaro* (19.4.1952) raportas en la ŝakluda kroniko : "En Francujo S-ro R. Gonin en Lyon dediĉas ĉiujarkvarone specialan kronikon skribitan en Esperanto por la blindaj ŝakludantoj.

Germanujo

Internacia junular-tendaro en Germanujo. La Germana Esperanto-Junularo (junulara sekcio de la

Germana Esperanto-Asocio), kune kun la SAT-Junulfako, invitas ankaŭ negermanajn esperantistajn gejunulojn al partopreno de sia internacia kaj tutgermana junular-tendaro en la rejnlanda urbo Solingen (apud Düsseldorf) je 9–16 aŭgusto. Programeroj estas diskutoj pri junulaj kaj sociaj problemoj, interŝanĝo de spertoj pri problemoj de la Esperanto-varbado inter gejunuloj, kant-vesperoj, ekskursoj, k.t.p. La partoprenantoj loĝos en junulargastejo kaj en grandaj tendoj. Aĝlimo 30 jaroj: scipovo de Esperanto necesa. La partoprenkostoj (inkl. restad- kaj manĝo-kostoj) estas 30 DM. Aliĝojn kaj informpetojn sendu al: G.E.J., Andreas-Hoferstr. 8, FREIBURG/Br., Germanujo.

Internacia Studenta Konferenco (IKESA), kiu okazos je 17–24 aŭgusto 1952 en Schluchsee, Suda Germanujo, estas malfermata de Prof. D-ro G. Canuto, Komitatano de U.E.A., Prezidanto de Itala Esperanto-Federacio, Rektoro de la Itala Universitato Parma. Informpetojn sendu al IKESA, Laksegade 35, KOPENHAGO K, Danlando.

Italujo

Itala Scienca Klubo Esperantista (ISKE) fondiĝis je 5 aprilo 1952 en Milano. Honora Prezidanto estas Prof. Canuto, Komitatano de U.E.A. kaj Landa Delegito de I.S.A.E. en Italujo. La klubo celas:

1. Kunigi ĉiujn italajn esperantistojn, kiuj interesiĝas pri la praktika aplikado de Esperanto en la kampo scienc-teknika, industria kaj komerca.

2. Eldoni terminarojn kaj fakajn vortarojn.

3. Kunlabori kun la I.S.A.E. kaj kun aliaj similaj eksterlandaj asocioj.

La provizora Sekretario estas Diplomita teknikisto Pierluigi Marelli, Piazza Napoli 40, MILANO, Italujo.

Kanariaj Insuloj

Denove kurso ĉe la Universitato de La Laguna. Ni ĝojas anonci, ke la nova rektoro ree permesis liberajn kursojn pri Esperanto. Sekve en aprilo komenciĝis kurso, gvidata de S-ro J. Régulo Pérez, kun lecionoj dufoje semajne.

Libano

Beirut. Ĉe la usona universitato propagandas Esperanton samideano Abul-Dahab. Ligajnis duan premion en oratora konkurso “Kiel mi povas plej bone servi miajn kunhomojn” parolante pri Esperanto. Kurso sekvos (kaj U.E.A. jam ricevis mendon por 75 lernolibroj).

Nederlando

La Internacia Asocio Bellamy daŭre utiligas Esperanton kaj lastatempe eldonis Esperantlingvan flugfolion. Informojn petu de Mitingo Bellamy, Sekr. Uiterweg 71, AALSMEER, Nederlando.

Svedlando

Bona progreso en Laponio. Nia fervora samideanino, instruistino Edla Isaksson en Koskullskulle, Dumviva Membro de U.E.A., kontente raportas pri bona rezulto de laboro en la plej norda sveda provinco. Estas nun nova klubo en Malmberg kun 22 membroj kaj ŝi ankaŭ bone varbis por U.E.A. La nova klubo havis loterion, gajnis 1000 sv. kr., kaj pro tio oni decidis pagi duonan kotizon por ĉiu membro, kiu volas aliĝi al U.E.A. Ĝis nun la rezulto estas, ke F-ino Isaksson sendis MA-pagon por 7 membroj. Ni gratulas kaj dankas al ŝi pro la bona laboro.

daŭrigo sur p. 216

Enigma Konkurso N-ro 70



Solvojn oni sendu al S-ro P. H. Mooy, 28 rue Stuyvenbergh, Brussel II, Belgujo. Por ĉiu tute korekta solvo oni kutime donas 5 poentojn. Ĉiufoje la tri personoj, kiuj havas la plej altajn poentnombrojn, gajnas premion. Ĉiu MA de UEA kun la sama ŝanco povas komenci la sendon de la solvoj je kiu ajn momento.

Pliaj informoj, se dezirataj, riceveblaj de S-ro Mooy kontraŭ unu respondkupono internacia.

Solvoj de la enigmoj en konkurso N-ro 68.

N-ro 151 : Pasero sperta estas lerta. Ŝlosilvortoj : paradigmo, apoteozo, sakristio, ekvatoro, romantika, oleandro, simpatio, peritonio, epigramo, regimento, tabureto, apostrofo, esperanto, sinoptiko, tribunalo, anekdoto, sublimato, lunatiko, etnografio, radikala, teleskopo, admiralo.

N-ro 152 : Ŝuldo ne brulas, tamen dormon detruas. Ŝlosilvortoj : paŝtisto, prudenta, kolofono, indiĝeno, brokanti, pantoflo, speciala, sabeliko, piramido, trumpeto, anapesto, biskvito, katalogo, staniolo, semaforo, stearino, zingibro, pedagogo, proverbo, karuselo, kamizolo, bronkito, vendredo, kodicilo, kreozoto, patricio, girlando, studento, gladiolo, hiskiamo.

N-ro 153 : En propra angulo ĉiu estas fortulo. Ŝlosilvortoj : cirklo, franko, sporto, kresto, karoto, plando, strebi, barako, starigi, najlo, groso, vualo, kamelo, spiono, ĉambro, kialo, paruo, mieno, kresto, partio, boato, sklavo, fringo, leporo, pastro, patroli, sutano, spliti, orelo.

Gajnis la premiojn post kontrolo de la 66-a konkurso : S-ro C. B. Zondervan (Ned) 155, S-ro Th. Sund (Norv) 148, S-ro W. Rusch (Germ) 147 p.

Enigmo N-ro 156 : 1. pastro ; 2. pedalo ; 3. polipo ; 4. admirari ; 5. sukero ; 6. angino ; 7. sprita ; 8. teraso ; 9. soriko ; 10. elkovi ; 11. elpeli ; 12. pediko ; 13. mateno ; 14. monako.

En la ĉi-supraj vortoj anstataŭigu du literojn per du aliaj, tiel ke vi povos formi el ĉiuj sesoj da literoj novajn vortojn laŭ la ĉi-subaj klarigoj. La novaj literoj (la solvanto mem decida pri la sinsekvo de la literoj en ĉiu duo) formas esprimon el la proverbaro de D-ro Zamenhof.

1. kortobirdo kun longa kolo ;
2. urĝa sciigo, sendita rapidvoje ;
3. kvanto da manĝaĵo ; 4. saltinsekto ;
5. lernanto skribas en ĝin ; 6. tre delikata plumaro ; 7. laŭleĝe preni iun kiel infanon ; 8. malalta temperaturo ; 9. plibonigilo por grundo ; 10. angla grenbrando ; 11. remi per unu remilo ; 12. sukcese eviti per forkuro ; 13. duonnegro ; 14. speco de ŝranko.

Enigmo N-ro 157 : Reordigu la ĉi-subajn litergrupojn, tiel ke ekestas kvin esprimoj el la proverbaro de D-ro Zamenhof.

1. aest - astr - ema - it'e - lbo - mpo - neĝ - ngu - nte - spr - sta - ust.
2. ade - alv - arm - ien - igo - nĝi - nto - nton - osl - pik - rpe - sse - viv.
3. bal - daŭ - isp - ivo - lav - nas - nfo - nur - ona - ond - rdo - sem - sĝi - tru - unu - uso.
4. ata - bos - ĉae - eli - lam - loi - lta - mpat - nsu - oko - plif - rte - sma - sta - tao.
5. ajm - ame - anĝ - anĝ - ask - ebe - iom - met - nas - ndo - onn - ont - zon.

Enigmo N-ro 158 : La ĉi-subaj nombroj prezentas la difinojn de 10 kvinliteraj vortoj, kies unuaj literoj en la donita sinsekvo formas dek-literan vorton. Por solvi ĝin skribu inverse la alfabeton kaj sub la literojn metu la neparajn numerojn, do z=1, v=3, ŭ=5, u=7, t=9 ktp. ĝis a=55.

daŭrigo sur p. 220

Prof. Joan Amades :

Fastkalkula bildo en Katalunujo

POR kalkuli la daŭron de la antaŭpaska fastado la Katalunoj kutimis tranĉi figuron el papero laŭforme de maljunulino kun sep piedoj. Tio simbolis la faston kun la sep semajnoj de ĝia daŭro. Tiun ĉi figuron oni pendigis en la supra parto de la fajrejo aŭ ĉe la plafono de la manĝejo. Ĉiun dimanĉon, reveninte de la meso, oni detranĉis unu piedon por signi ke forpasis unu plua semajno de la malagrabla fastotempo. Ordinare oni detranĉis la piedojn alterne de la dekstra kaj maldekstra flankoj. Tiel oni ĉiam sciis kiom da fastaj semajnoj jam forpasis kaj kiom ankoraŭ restas.

Tiuj ĉi figuroj varias laŭ la plaĉo kaj artkapablo de la tranĉinto sed ili ĉiam montras virinon kun sep piedoj aŭ—tre malofte—sep brakoj.

Oni iafoje vendis presitajn bildojn de tiu figuro sed estis pli laŭtradicie mem fari ĝin per tranĉita papero. La specimeno ĉi tie montrata estas presita en Barcelono je la fino de la XVIII-a jarcento. En la insulo Menorca oni vendis ĝin tranĉita el kartono kaj manpentrita kaj tiuj vere estas popoldokumentoj. En Mallorca oni faris ĝin el ligno kvazaŭ pupon kaj vestis ĝin per riĉaj ŝtofoj ; tia figuro estis multekosta kaj tial oni ne

detranĉis ĝiajn piedojn sed per speciala mekanajo malaperigis ilin sub la veston.


Oni donis al tiuj figuroj diversajn nomojn. La ĝenerala estas *quaresma* (granda fasto). Oni krome nomis ĝin en Barcelono *bacallanera* (gadvendistino) ĉar ŝi ĉiam portis gadon en la mano ; en Solsonès *serraina* (arabino) ; en Rossello* *patorra* ; en Mallorca *sa jaia serrada* (segata maljunulino kaj en Menorca *s'avia corema* (avino Fastego).

La uzado de tiu fastkalkulilo daŭris ĝis komenco de la nuna jarcento precipe en la kamparo kaj en hejmoj kie estis infanoj, kiuj ĝojis fortranĉi la piedojn de la malagrabla maljunulino. En iuj hejmoj, fastomeze, oni distranĉis la figuron en du pecojn por signi ke oni jam atingis la duon de la rigora

tempo. En Ciutat de Mallorca la urbestro organizis publikan spektaklon sur la ĉefa placo dum kiu la ekzekutisto dissegis grandan lignan figuron de la fasto je granda ĝojo de la popolo, kiu rigardis la komedion.

La lasta piedo, kiun oni detranĉis, estis la meza, iafoje pli granda ol la aliaj. En Solsonès rajtas fortranĉi ĝin la infano de la hejmo kiu plej frue ellitiĝis la paskan dimanĉon, kaj oni

* France : Roussillon



Ĉi tiu specimeno estas presita en Barcelono je la fino de la XVIII-a jarcento

ankaŭ premiis ĝin per granda ovaĵo por la matenmanĝo.

Ordinare, je la pentekosta dimanĉo oni forbruligis la figuron en la hejma kuirfajro. En Menorca oni rikoltis la cindrojn kaj la infanoj portis ilin en funebra procesio ĝis la hejma ĝardeno aŭ kampo kie ili enterigis ilin.

En la gadvendejoj anstataŭ papera figuro oni pendigis ĉe la plafono grandan gadon de kies malsupro pendis sep grandaj sardeloj. Ĉiu-semajne oni detranĉis unu sardelon, ceremonio kiu tre amuzis la klientaron. Samajn kutimojn oni trovis ankaŭ en La Alguero, katalunkultura urbeto sur la itala insulo Sardinio.

(Noto: Prof. Joan Amades estas vic-direktoro de la Muzeo pri Popolaj Industrioj kaj Artoj en Barcelono, kaj prezidinto de Kataluna Esperantista Federacio.—Red.)

daŭrigo (de p. 213)

Fervojistoj

La 4a Kongreso de Internacia Federacio de Esperantistaj Fervojistoj okazis en Lindau, Germanujo en Majo 1952 kiam ĉeestis 450 samideanoj el 14 landoj. Dum la solena malfermo reprezentigis la Aŭstra, Franca, Norvega kaj Nederlanda fervojaj direkcioj, kaj krome la ĉefa Urbestro de Lindau kaj aro da sindikataj organizaĵoj. Ĉeestis ankaŭ reprezentanto de U.E.A. La diskutoj estis plejparte pri interna organizado kaj progreso de I.F.E.F., kiu nun havas 1.100 membrojn. La alia laboro de la Kongreso rilatis plejparte al pretigo de fervojaj fakvortaroj. Okazis vizitoj al riparejoj, fakprelegoj kaj diversaj ekskursoj. La venonta Kongreso okazos en Utrecht, Nederlando, en Majo 1953.

Internacia Konkurso 1952

Stato je 31a de Majo 1952

	Lando	Kvoto	Poentoj	%
1.	Izraelo ..	350	495	141.4
2.	Maroko ..	500	555	111.0
3.	Islando ..	400	390	97.5
4.	Svislando ..	1400	1350	96.4
5.	Japanujo ..	900	855	95.0
6.	Germanujo ..	3200	3035	94.8
7.	Aŭstralio ..	850	785	92.3
8.	Urugvajo ..	250	225	90.0
9.	Sud-Afriko ..	300	270	90.0
10.	Kanado ..	250	225	90.0
11.	Belgujo ..	2300	2035	88.5
12.	Danlando ..	2700	2375	88.0
13.	Francujo ..	5500	4574	83.2
14.	Britujo ..	12000	9928	82.7
15.	Usono ..	2500	2063	82.5
16.	Hispanujo ..	1300	1060	81.5
17.	Nederlando ..	4800	3850	80.2
18.	Finnlando ..	2600	2030	78.1
19.	Italujo ..	2200	1710	77.7
20.	Norvegujo ..	1700	1255	73.8
21.	Svedlando ..	5200	3815	73.4
22.	Kubo ..	250	175	70.0
23.	Brazilo ..	4500	3057	68.0
24.	Portugalujo ..	800	540	67.5
25.	Nov-Zelando ..	800	525	65.6
26.	Aŭstrujo ..	1000	615	61.5
27.	Irlando ..	250	130	52.0

La ĝisnunaj rezultoj estas kontentigaj, kaj ŝajnas ke minimume 10 landoj atingos 100% kaj 20 landoj pli ol 90% antaŭ la fino de la jaro. Vi povas helpi al tia rezulto por la propra lando, kaj samtempe helpi al ni eldoni nian revuon laŭ ĝia nuna amplekso, se vi persvados viajn amikojn kiuj ĝis nun ne repagis siajn kotizojn, tion fari sen plua prokrasto. Se vi deziras vidi nian revuon kun pli da paĝoj varbu novajn membro-abonantojn kaj tiel plifortigu nian Asocion. **Unueco estas forto!**



Nia 'Forumo

PAROLAS LA LEGANTOJ

Korespondantoj nepre esprimu sin koncize kaj mallonge. Antaŭ ol sendi leteron por publikigo kontrolu la longon per komparo kun jam presita teksto.

Presigo de letero de korespondanto ne necese signifas ke U.E.A. oficiale subtenas la esprimitajn opiniojn.

Prospektoj kaj reklampresaĵoj en Esperanto

La internacia Esperanto-gazetaro regule raportas pri turismaj prospektoj aŭ propagandiloj, kiujn eldonas oficialaj instancoj kiel urbestro, turisma entrepreno aŭ firmao. Ĉiufoje oni tiam ankaŭ povas legi, ke la Esperantistaro sendu gratulajn skribaĵojn al la eldoninto aŭ oni petu provekzempleron.

Estante tradukanto por Esperanto en oficiala turisma oficejo, mi spertis, ke granda parto da gesamideanoj kiuj alskribas plej ofte tion faras tre mallerte! Samideanoj! Komprenu ke la eldonintoj neesperantistaj tute ne emas legi, ke vi deziras ricevi la eldonaĵojn por kompletigi vian kolekton aŭ arĥivon! Neniam skribu, ke vi deziras la presaĵojn nur por vidi, ĉu vere Esperanto estis uzata en ilia tekstaro! **Kutimiĝu skribi, ke vi interesiĝas pri la urbo, regiono aŭ varo (laŭbezono).**

Neniam skribu, ke la presaĵoj estos uzataj nur por Esperanto-ekspozicio, sed **akcentu, ke ili servos por diskonigi la famon de la koncerna entrepreno, varo, urbo aŭ regiono!** Viaj skribaĵoj ĉiam havu ĝeneralecan tekston kaj ili neniam substreku nur vian ĝojon esperantistan pro nova sukceso atingita! Ni klopodu, neniel kontribui al kelkloke reganta opinio, ke ni esperantistoj estas anoj de strangula sekto!

Mi petas la Esperanto-gazetojn de tempo al tempo ripeti tian alvokon,

kaj la Esperanto-grupojn trakti tiun aferon dum la grupvesperoj ripetfoje! Per tio ne evitos seniluziigon de favoraj instancoj!

T. Grazano, Aŭstrujo.

Utiligo de informoj

Bonvolu permesi al mi mallonge raportiti kiel mi uzis la lastajn numerojn de via gazeto por propagandi Esperanton.

1. Mi iris kun la demandaro de la universitato Lund (koncerne ĉevalbuĉado) al kelkaj ŝtataj kaj urbaj veterinaroj en nia urbo kaj petis informojn. Okaze mi menciis la internacian sciencon signifon de nia lingvo.

2. Mi rakontis al la direktoro de nia folkloro muzeo, ke en la revuo ni povas ofte legi artikolojn pri folkloristaj faroj. Speciale la direktoro havis intereson pri la artikolo *Anglaj popoldancoj* kaj mi tradukis al li la enhavon. Li konfesis, ke nur per Esperanto estas eble, ke la sciencistoj de la tuta mondo ricevu interesajn raportojn el la tuta mondo.

3. La inviton al la kongreso de universitatanoj en Schluchsee mi publikigis en la tagĵurnaloj de Graz kaj sur la nigra tabulo de altlernejoj, universitato, k.t.p. kun permeso de la rektoroj.

4. Ankaŭ mi petis la direktoron de nia komerca lernejo permeson meti sur la nigran tabulon mallongajn komercajn informojn el la revuo (germane kaj esperante).

O. Meister, Aŭstrujo.

Efika propagando

Jam delonge mi intencis skribi al *Esperanto* pri ideo, kiun mi trovas efika por la propagando. Anstataŭ legi miajn Esperanto-gazetojn en la hejmo mi kutime faras tion en restoracioj, kafejoj, vagonaroj k.s. tamen ĉiam zorgante, ke la publiko povu vidi la vorton ESPERANTO.

Jen nur unu ekzemplo de la rezulto. Nur hodiaŭ matene mi faris mian kutiman paradeton de la titolpaĝo kiam maljuna sinjorino venis al mi kaj alparolis per: "Pardonu min sinjoro. Mi petas sciigon. Ĉu vi povas indiki al mi butikon kie mi povas aĉeti Esperantajn librojn? Ni havas hejme kompatindan enliten restadantan pacienton kiu studis la lingvon antaŭ multaj jaroj kaj li tre deziras komenci denove, sed ne scias kie havigi al si librojn por tio."

S. Nicoll, Worthing, Anglujo.

Neo

Oni avertas min, ke Interlingua-eldonantoj uzas mian nomon por sia propagando. Tion oni ne rajtas, ĉar mi konstante rifuzis invitojn partopreni en tiu komitato. Mia intereso, kiel lingvisto, kuŝas en la sperto de lingvo uzata, kiel Esperanto, kaj mi ne volis partopreni en teoriaj proponaĵoj. Bonvolu korekti la eraran informon kaj kredi min danke via. *Edmond Privat, Svislando.*

Mia mio

La spritaĵo de s-ano Searle (*Esperanto*, n-ro 558) estas legitima, sed ĝi baziĝas sur eraro. Eventuala "serio" estus: mia mio, lia mio, niaj mioj, iliaj mioj, k.t.p.

Ke la esprimo estas komprenebla pruvas tio, ke multaj legintoj ĝin komprenis. Eble s-ano Searle intencis nomi ĝin netradukebla? Tio ja estas alia afero. *W. Auld, Skotlando.*

Ĉu parazitismo?

S-ro Mason Stuttard skribis en la aprila n-ro de *Esperanto* artikolon pri membroj—aŭ eble nemembroj—de nia organizo, kiuj intencis veturi kaj restadi sen- aŭ malmulte-koste kaj eĉ fanfaronas pro tio dirante, ke ili jam faris longan veturadon senpage, ĉar ili estas esperantistoj. M.S. memorigas nin pri la malnova proverbo: *Pli bone estas doni ol ricevi*. Jes, M.S., se estas eble por ni doni. Ekzistas ja ankaŭ alia proverbo: *Pli bona io, ol nenio*, se temas pri laboro por Esperanto. Se oni ne kapablas veturi, manĝi kaj loĝi lukse, ankaŭ fari tion alimaniere povas valori. Multaj kluboj esperantistaj ne povas pagi al instruisto aŭ prelegisto decan salajron—ofte ĉar oni ne povas okupigi la instruiston pli ol po du horojn tage, aŭ ĉar tro malmultaj aŭskultantoj ĉeestas la prelegistan prelegon—kio tute ne bezonas esti la kulpo de la prelegisto—multe helpas kaj al la kluba kaso kaj al la prelegisto aŭ instruisto, se iu povas doni al ili senpagan restadon. Eĉ vojaĝantajn esperantistojn eksterlandajn, kiuj ne kapablas instrui aŭ prelegi, diversaj kluboj kaj klubmembroj ĝoje akceptas kaj donas al ili senpagan restadon dum kelkaj tagnoktoj por tiamaniere plulerni Esperanton. Eble la eksterlandano pro manko de sperto faras kelkajn lingvajn erarojn, sed ordinare ili estas aliaj ol tiuj, kiujn faras samlandano. Kompreneble devas ĉiuj agi dece; sed tio valoras kaj se oni pagas lukse kaj se oni pagas tute nenion.

Por ke Mason Stuttard ne tro timigu la vojaĝantajn esperantistojn, kriante por ili 'parazitojn' mi verkis tiun respondon.

H. L. Egerrup, Danlando.

LOFTHUS

Juvelo de la okcidenta Norvegujo

MULTAJ gesamideanoj jam konas Lofthus pere de la bonegaj aranĝoj de Norvega Esperantista Ligo dum la lastaj jaroj. Tiuj kiuj ne konas Lofthus ne pensu pri grandurbo. Oni verŝajne eĉ ne trovos ĝin sur la landkarto en la eksterlando! Lofthus situas proks. 75 km. oriente de Bergen kaj 30 km. norde de Odda, en la komunumo Ullensvang en Hardanger, sur la orienta bordo de Sjøfjorden, suda brako de Hardangerfjordo.

Estus malfacile imagi pli idilian restadejon. Kuŝante ĉe la fjordo, kun la montebenaĵo Hardanger unuflanke kaj la glaciejo Folgefonna aliflanke, Lofthus estas vera juvelo. La tereno Hardanger estas unika turisma loko kun aroj da boacoj renkonteblaj sur la altaĵoj. Alte en la freŝa aero oni akiras novajn fortojn kaj sentas tian vivĝojon, kian donas nur restado en la montaro. Folgefonna estas neforgesebla, sed tien oni iru nur kun sperta gvidisto kaj nur se oni povas toleri la streĉon de grimpado sur glacio.


En la somero la restadejo Lofthus estas ridetanta, ĉarma loko kun fruktaroj kaj floroj kaj herbejoj. Tute proksime iam havis someran domon Edvard Grieg, kaj aŭskultante la sorĉan muzikon de la naturo, de la akvofaloj kaj riveroj plaŭdante mal-supren, oni venas pli proksimen al la esenco de la mesaĝo kiun tiu majstro donis al la mondo per siaj obsedaj melodioj sugestiantaj intiman konon de la niksoj kaj diversaj alimondaj estaĵoj de la arbaro kaj altmontaro.



Eĉ ne forirante de Lofthus mem la vizitanto ĝuus senegalan kaj plene kontentigan regalon, sed dum oni estas tie, konvenas vidi kiel eble plej multon. Valoras fari ekskurson al la pinto de Nosa (la nazo) de kiu oni povas ĝui spirhaltigan panoramon. Per promeno laŭ la fjordo oni povas viziti la industriajn lokojn Tyssedal kaj Odda kaj survoje senhalte admiri unu ravan pejzaĝon post alia. En Tyssedal troviĝas impona elektrostacio kiu donas interesajn momentojn al vizitantoj.

Per motorboata ekskurseto sur la lago la turisto povas rigardi la vertikalajn montomurojn de kies suproj kaskadas belegaj akvofaloj Tysestrengene kaj Skjeggedalsfossen distancon de 1000 m.!

Irante norden laŭ la fjordo oni preteriras pejzaĝojn de rivero, valo, ebenaĵo, monto ĝis konata akvofalo Vøringfossen, kiu havas vertikalan falon de 191 metroj. Interesa serpentuma vojo kondukas supren el la



abismo. Neforgesebla vidindaĵo. De supre oni ĝuas belegan elrigardon.

Trans la fjordo en Aga troviĝas domoj el malnova epoko kaj vidinda estas preĝejo el la 13-a jarcento.

La partoprenantoj de la post-kongresa semajno en Lofthus havos unikan okazon ekkoni fazon de la norvega naturo, kiu elĉerpas ĉiujn superlativojn. Arangoj pri ekskursoj kaj restado estas en la manoj de la okcidentregionaj gesamideanoj, kiuj jam akiris reputacion en tiu rilato. La Esperanto-semajno komenciĝos dimanĉon 10 aŭg. kaj verŝajne finiĝos la sekvantan dimanĉon. Loĝejoj kaj manĝoj estos bonaj (tute **ne** primitivaj aŭ laŭ "amasrestejo"). Kongresanoj povos atingi Lofthus per trajno de Oslo ĝis Granvin (ŝanĝu en Voss), kaj de Granvin ili iros trans la fjordon per ŝipo al Lofthus. Iuj kongresanoj jam konstatis, ke ili povas ŝpari valuton mendante la trajn- kaj

ŝipbiletojn en sia lando. Tiel ili pagas al L.K.K. en Oslo nur la koston de restado en Lofthus.

Por la reiro laŭ Bergen oni povas tien iri de Lofthus per ŝipo aŭ laŭ Granvin-Voss.

Kompilis M.S.

daŭrigo (de p. 214)

Ĉiu donita numera difino estas la produto de la nombroj respondantaj al la literoj de la koncerna vorto. (Ekz. patro estus difinita per $17 \times 55 \times 9 \times 15 \times 19 = 2398275$).

(1) 139528125 ; (2) 7811375 ; (3) 51541875 ; (4) 13496175 ; (5) 2793285 ; (6) 793155 ; (7) 19045125 ; (8) 190575 ; (9) 305235 ; (10) 33152625.


S-ro A. G. Rickwood (Angl) ensendis tiun ĉi tre interesan enigmon, kiun mi tamen prezentas eksterkonkurse, se ne minimume 25 personoj ensendos bonan solvon.

S-ino Erika Linz :

Ekvido en la Pasintecon

MI rigardas malsupren sur la maron ekbrilantan per la lumo de la leviĝanta suno. Blankaj maldensaj nebuloj suprenleviĝas de sur la akvo. La unuaj sunradioj brilas trans la oceanon. Estos klara, sunplena tago.

Kvar ŝipetoj naĝas tie proksime de la granda krutaĵo *Bela Insulo*. Malhelhaŭtaj viroj remas en ili. Ĉu ili eble estas indianoj de la gento *Tupinamba*, veturantaj surprizataki siajn malamikojn de alia indiana gento? Okazis ja sur tiu sama insulo, ke ili tranoktis antaŭ kvarcent jaroj dum militiro. Sur la tria ŝipeto ili havis tiam blankhaŭtulon, sian kaptiton. Tiuj kanibaloj estis kunprenintaj lin por lin manĝi antaŭ la batalo. Li estis germana soldato Hans Staden. Dum lia deĵoro kiel soldato por la portugalaj konkerantoj de Brazilo en la fortikaĵo Bertioga, li estis surprizatakata de la Tupinamba-oj kaj kaptata. Bertioga estas marborda loko tre proksime de ĉi tie. Mi bone konas ĝin. La Tupinamba-oj malamamis la Portugalojn ĉar tiuj traktis ilin tre malbone. Ili tial kunprenis la kompatindan Hans Staden en siaj ŝeloŝipoj hejmen en sian komunumon kaj sciigis lin, ke ili manĝos lin dum granda festo. Tio ja estis ilia sovaĝa kutimo. Preskaŭ tutan jaron li estis ilia kaptito, ĉiam atendanta la avizitan morton. Li lernis ilian lingvon, ekkonis iliajn kutimojn kaj laborojn. Fine li tamen estis savata, revenis hejmen al Germanujo kaj rakontis ĉion, kion li travivis en libro ornamita per belaj ilustraĵoj "por disvastigi la gloron de Dio la Sinjoro, kiu savis min tiom



Kliŝo : Eldona Societo


mirinde", kiel li mem ŝkribis. Tiu ĉi libro *Wahrhaftig Historia* (vera historio), publikigita en la jaro 1557 estas la plej malnova libro pri Brazilo, kiu ekzistas. El la rakontoj kaj la bildoj oni ekscias tre bone, kiamaniere vivis tiuj indianoj, kiuj certe estis la prauloj de la nun ĉi tie vivantaj *kabokloj* (=kuprokoloruloj).

Kuprohaŭtuloj estas ja ankaŭ tiuj homoj en la kvar ŝipetoj—fiŝkaptistoj el Caraguatatuba.

Tamen ĉu fakte pasis 400 jaroj jam de tiu tempo?

Hans Staden rakontis: "Se la Tupinamba-oj volas planti, ili dehakas la arbojn sur la loko elektita kaj lasas ilin sekiĝi en la sunbrilo dum proksimume tri monatoj. Poste ili ekbruligas ĉion. Post la brulado ili plantas tie trunkopecojn de la radikoplanto, kiun ili uzas kiel panon. Tiu ĉi planto nomiĝas *manioko* . . ."

Monĵolo



Kaj jam tie proksime ja estas montodeklivo ankoraŭ tute nigra de granda fajro, kiu forbruligis sur ĝi la sekan foliaron kaj branĉaron. La dikaj arbotrunkoj duonkarbiĝintaj kuŝas ĉiuflanke. Inter ili oni klare vidas la tute ne simetrie faritajn truojn en la tero, en kiujn la *kabokloj* hieraŭ aŭ antaŭhieraŭ metis la pecetojn de la maniokotrunkoj inter la nigraj arbostumpoj! La *kabokloj* ne konas alian agrikulturon. Ili neniam forigas la stumpojn, neniam sterkas la teron racie, ne kultivas alterne la plantojn, kaj neniam sterkas siajn plantojn. Agrikulturajn maŝinojn ili ne konas. Eĉ ne la plugilon! Ili posedas sole kvar ilojn: longtenilan hakilon, falĉileto-similan ankaŭ longtenilan *foison* kaj du foshakilojn kun malsamaj formoj. La rizon ili rikoltas tranĉante ĝin per poŝtranĉiloj! Ili draŝas ĝin sen ia ajn ilo laŭ plej primitiva maniero.

Eĉ la nocio, *kampo*, estas fremda por ili. La portugala vorto *campo* signifas por ili *stepo*, do per graminacoj surkreskita loko, kiaj ekestis kaj ankoraŭ estas nun, kie la *kabokloj* kultivas la teron dum 12-15 jaroj.

Ili eĉ ne uzas la radon, tiun grandiozan homan inventon, kiu

estas tiel malnova, ke oni jam ne scias, kiu eltrovis ĝin. Ĝi ne helpas al ili transporti ŝarĝojn. Ili portas ĉion sur la propra dorso aŭ sur la dorso de muloj. Eĉ ne puŝveturilon ili konas. La rado ĉe ili ne kaptas, kiel muelrado, la forton de la fluanta akvo. Ilia plej evoluinta "maŝino" estas la *monĵolo*. Tiu estas aparato kun pelvo. La akvo plenigas la pelvon, kiu fariĝas pli peza kaj per ĝia malsupreniĝo levas pistilo-fino. La akvo elfluas kaj la denove pli peza pistilo-fino malsupren falas en la pistilujon. Tiel ĝi pistas la maizon k.s. Kompreneble tiamaniere, malgranda kvanto bezonas multthoran laboron de la monĵolo.

La rado krome ne servas al la *kabokloj* kiel potista disko. Por kuir i ili uzas metalajn potojn kiujn ili aĉetas, sed plej ofte forĵetitajn konserv-skatolojn, kiujn ili trovas en la urbo. Nur la akvon ili portas kaj konservas en argilaj potoj. Tiujn faras tie kaj tie maljuna virino. Ŝi faras el knedita argilo dikajn *kolbasojn*, metas unu sur alian kaj per la manoj kunknedante faras grandan ujon, kiun ŝi bakas poste en tre tre primitiva entera forno po 4-5 tiaj potoj.

daŭrigo sur p. 224

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Centra Oficejo : Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo
OFICIALA INFORMILO

N-ro 240

7-an de Junio 1952

STATISTIKO. Jen la stato de la membraro je la fino de Majo, kaj ankaŭ, por komparo, je la sama dato en 1951 :

	1951	1952
Asociaj membroj ..	3944	3842
Individuaj membroj		
MJ 741		769
MA 4212		3508
MS 273		460
Patronoj .. 16		9
DM 215		259
HM 58		57
	5515	5062
	9459	8904

DELEGITOJ

Aŭstralio

Goomeri. D : vakas.

Aŭstrujo

Graz. FD (Akcidentoj, malebligo de) : D-ro O. Meister, Burggasse 16-II.

Belgujo

Charleroi. VD kaj FD (Sociaj leĝoj) : vakas.

Brazilo

Baturité (Ceará). D : J. Francelino de Oliviera, Praça Santa Luzia 127.

Niterói. FD (Bankaj aferoj) : E. Villa Verda, Rua Joaquim Távora, Edifício Moema. Tel : 2.2801.

Recife. FD (Studentaj aferoj) : J. L. Egito, Caixa postal 1442. Tel : 2656.

Rio de Janeiro. FD (Komerco) : N. Pereira de Souza, Rua Visc. Santa Cruz 142, ap. 201, Eugenio Novo.

Britujo

Poole. D : vakas.

South Cerney. D : vakas.

Witcombe. D : G. L. Preedy, Caversham, Oxford Road, Little Witcombe, Gloucester.

Danujo

Aarhus. FD (Virinaj aferoj) : vakas.

Hareskov. D : vakas.

Søby pr Hou. D : F-ino Tove Madsen. Tel : Fensten-Søby 27.

Finnlando

Kankaanpää. D : Taito Lippahainen, Veneskoski.

Lammi. D : vakas.

Germanujo

Hamburg. FD (Turismo) : F-ino H. Lanka, Alsterdorferstr. 109, III, Hamburg 39.

Stuttgart. D : F-ino F. Christaller, Immenhofer Str. 14, Stuttgart S.

VD : K. Körschenhausen, Posener Str. 12, Stuttgart-Möhringen. Tel : 97746.

Hispanujo

Barcelona. FD (Maraferoj) : R. Gisbert, Avda. Generalísimo Franco 338, 2, 2a. Tel : 25 84 33.

FD (Skribmaŝinoj) : E. Pons Martorell, Nápoles 235, 4-1a.

Japanujo

Huzisawa. D : vakas.

Kongo Belga

Elisabethville. D : Pierre Paulus, Agént d'administration, c/o U.M.H.K.

Svedujo

Hällabrottet. VD : N. Gustafson, Fack 30. Tel : 72003.

Svislando

Richterswil. D : vakas.

Usono

Peoria (Ill.). D : vakas.

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Ackers, S-ro S., Henley-on-Thames, Anglujo
Schmid, S-ro W., Göggingen, Germanujo
Sonnenfeld, S-ro E., Buenos Aires, Argentino

PATRONOJ 1952

9. Coutinho, S-ino M. S., Belo Horizonte, Brazilo

MEMBRO-SUBTENANTOJ 1952

447. Svarstad, S-ro I., Los Angeles, Cal., Usono

448. Clark, S-ro F., Wunstorf, Germanujo

449. Hering, S-ro A., Nürnberg, Germanujo

450. Treude, D-ro W., München, Germanujo

451. Pot Az, S-ro C., Slikkerveer, Nederlando

452. Pimentel, S-ro C., São Paulo, Brazilo

453. Rocha, S-ro P. N., Franca, S.P., Brazilo

454. Cooper, S-ino H. V., Bromley, Anglujo

455. Hilder, S-ro E. C., Bideford, Anglujo

456. Rizzo, D-ro P., Perugia, Italujo

457. Buchli, S-ro H., Bern, Svislando

458. Vasiljef, S-ro L., København, Danlando
 459. Cettini, S-ro G., Perth, Aŭstralio
 460. Poole, S-ino A. L., Blackpool, Anglujo
 461. Spence, S-ino F., Watford, Anglujo
 462. Chapman, S-ro J. L., West Palm Beach, Usono
 463. Jagoda, S-ro M., Brooklyn, N.Y., Usono
 464. Kail, S-ro K., Spencer, Iowa, Usono
 465. Kail, S-ino M., Spencer, Iowa, Usono
 466. Tuch, F-ino R. M., Toronto, Kanado
 467. Alves, D-ro J. P., Domingos Martins, Brazilo
 468. Castro, S-ro A. F. de C., Rio de Janeiro, Brazilo
 469. Habib, S-ro G. J., Rio de Janeiro, Brazilo
 470. Hoyle, S-ro J., Manchester, Anglujo

DONACOJ. E. G. Dodge 70ŝ., A. Llinás 4ŝ., T. J. Gueritte 100ŝ., H. Böcker 14ŝ., J. Antunes 3ŝ. 4p., Avoto 10ŝ., C. E. Dukinfield 5ŝ., J. C. Hall 5ŝ., H. C. Allen 2ŝ. 6p., E. C. Hilden 10ŝ., H. Davis 20ŝ., J. Brennan 2ŝ. 6p.

Sinceran dankon al ĉiu helpanto.

C. C. GOLDSMITH, *Sekretario.*

daŭrigo (de p. 222)

Ankaŭ la dometoj de la *kabokloj* tre similas al tiuj de la Tupinamba-oj, konstruitaj sen segilo, sen martelo, sen najloj.

La kabokloj ne plu iras nudaj, sed vestas sin per katunaj ŝtofoj aĉetitaj en la urbo, sed ĉar tiuj estas multekostaj kompare kun la malmulto, kion ili povas vendi el sia agrikulturo, ili uzas la vestojn ĝis ili konsistas plie el truoj ol el ŝtofo!

Ili jam ne estas kanibaloj. Pli altan kulturon ili tamen ankoraŭ ne atingis. La kristanismo, kiu ĉe ili anstataŭis la indianan idolismon, fariĝis en iliaj kapoj terura miksaĵo de ĉiuspecaj superstiĉoj.

Mi denove demandas: Ĉu vere pasis kvarcent jaroj jam de la tempo de Hans Staden? Tamen devas tiel esti. Flugas ja ĉi tie superkape pluraj aeroplanoj ĉiutage.

Esperantista Vivo

Naskiĝo

Brezovšek. Al Ges. Brezovšek Bogo (D. de U.E.A., Štepanška 8, Ljubljana, Jugoslavujo) tria infano, filo Roberto, je 5 junio 1952. Baptogepatroj estas geesperantistoj en Usono!

Geedziĝo

Wijnbelt—Knoot. S-ro F. A. Wijnbelt kun F-ino Rosalia N. M. Knoot (D. de UEA en Sleeuwijk, Nederlando) je 2 majo 1952.

Niaj mortintoj

Ni eksciis pri la forpaso de la jenaj samideanoj al kies parencoj ni volas esprimi nian profundan kondolencon.—Red.

Asbee, F-ino D. M., Esperantistino de post la U.K. en sia hejmurbo, Oxford, Anglujo, ŝi daŭre laboris ĝis la morto je 27 januaro 1952.

Nicolaiew, Nicolas, bulgara esperantisto, eks-funkciulo de la Internacia Labor-Oficejo en Ĝenevo, longjara membro de UEA, forpasis je 18 majo 1952 en Ĝenevo.

Postnikov, Kap. F. A., mortis je 10 majo 1952 en Little Rock, Arkansas, Usono. Eĉ ĝis la nuna jaro vigla propagandisto, li estis en 1898 Prezidanto de la Societo "Espero" en St. Petersburg, Rusujo.

daŭrigo (de p. 210)

Bingen : la pordego al la romantika parto de la Mez-Rejno. Faldfolioeto kun interesaj notoj pri la historio de la urbo, kaj pri nuntempaj vidindaĵoj kaj festoj. Petu ĉe Städtisches Verkehrs—und Presseamt, Bingen am Rhein, Germanujo.

Stirio, Aŭstrujo : du gravure presitaj, riĉe ilustritaj gvidfolioj (grandformataj—kun 20 kaj 24 paĝoj), teksto kvinlingva (germana, angla, franca, itala kaj Esperanta), invitas nin pasigi vintron en la lando. Petu ĉe Landesfremdenverkehrsamt für Steiermark, Graz-Landhaus, Aŭstrujo, samtempe petante la gvidilon pri hoteloj : ĉio senpaga.

Köln, Germanujo : ilustrita faldfolioeto, kiu interese skizas la historion kaj vizitindecon de la urbo. Petu ĉe Verkehrsamt der Stadt Köln, Domkloster 3, Köln, Germanujo.

ANONCETOJ

Kosto : du pencoj por ĉiu vorto, aŭ internacia respondkupono por ĉiu duo da vortoj.

Ĉiu anoncanto morale devigas sin respondi minimume unu fojon al ĉiu kiu skribas.

Anonceto por iu numero devas atingi nin antaŭ la 6-a de la antaŭa monato.

La paroloj de la Eternulo estas paroloj puraj, Arĝento, purigita en tera fandujo kaj sepfoje refandita. Ps. 12. 6.

Belga Fremdultrafika Servo. Bonvolu sendi : Eŭropajn vojaĝprospektojn, adresojn de vojaĝentreprenoj. Mi rekompencos. 109 Konijnenperken, BOSVOORDE-BRUSSEL, Belgujo.

Pensologio celas helpi homojn de ĉiu religia krednuanco. *Klarigaj vortoj* (senpage); *Preĝo de nia Sinjoro* (2 respondkuponoj); *Povo Sukcesi* (3 respondkuponoj). Skribu dezirojn. Hipsley, 17 Abbots Road, BIRMINGHAM 14, Anglujo.

Ne-katolikoj, kiuj deziras informojn pri la katolika religio, povas ricevi ilin senpage de la Internacia Katolika Informejo, LOONOPZAND (N.Br.), Nederlando.

Sud-Afriko, bela lando ; grava estonto. Legu pri ĝi. Libroliston sendos, kontraŭ kelkaj vialandaj uzitaj poŝtmarkoj : "Informo", SILVERTON, Sud-Afriko.

Esperantista grupo deziras korespondi per leteroj aŭ poŝtkartoj kun gesamideanoj tutmondaj. Skribu al : Per Engen, VESTFOSEN, Norvegujo.

Maksimum-poŝtkartojn tutmonde interŝanĝas : Monsieur de la Ferté, 30 Drachenfelsstrasse, BAD GODESBERG, Germanujo. Korespondas angle, france, germane, hispane kaj esperante. Bonvolu atentigi viajn amikojn ! Nepre respondos. *Klarigo* : m.p. reprezentas ekzakte la saman objekton (konstruaĵon, pejzaĝon, portreton, k.t.p.) kiel la bildflanke fiksita poŝtmarko, stampita je la loko kie la objekto troviĝas.

Amnon Avinal, 13 Ŝpinoza str., TEL-AVIV, Izraelo, interŝanĝas poŝtmarkojn kaj etiketaĵajn alumetskatolojn.

S-ro Eric Castell, Postfack 62, RYD, Svedujo deziras interŝanĝi neskribitajn kolorajn bildkartojn.

Aŭspicie de la madrida esperantistaro kaj delegito de U.E.A. en Madrid ni disponigas al tutmonda esperantistaro oficejon dediĉatan sendi, ricevi ĉiajn varojn, objektojn, ĉiaspece, interŝanĝe, vende aŭ aĉete. Skribu al A.C.E. (Hispanaj Komercaj Agadoj), Trafalgar 23, MADRID, Hispanujo.

Radio amatoroj samideanaj ! Skribu al A. Moody, 37 Upper Tooting Road, LONDON, S.W.17, Anglujo, sciigante horojn de viaj elsendoj. Mia ricev-aparato funkcias seninterrompe de 13 ĝis 550 metroj. 80 metroj preferata. Mi estas preta aŭskulti kaj raportu pri viaj elsendoj kontraŭ antaŭsciigo.

Gekongresanoj travojaĝontaj Germanujon petu vojaĝkajerojn (ilustritajn turist-informilojn) esperantlingvajn, pro vojaĝ-informoj, rekte ĉe : Tourist-Information Amt., BINGEN a/d Rh., Germanujo.

Profitu la okazon ! Pionira kuracilo kontraŭ la epizootio de la duhufuloj (bovaro k.t.p.) en la buŝo kaj la ungegoj, kiel ankaŭ kontraŭ aliaj malsanoj, estas evoluigita kaj pruvita en multjaraj eksperimentoj. Ĝi estasproduktebla sen malsimplaj stabloj. En Germanujo oni petis patenton je la fabrikad-metodo. Interesiĝantoj por ties realiĝo en ĉiuj landoj de la mondo, aŭ helpantoj de tiuj, estas petataj sin turni al S-ro Fr. Bierhoff, Brühlstrasse 21, KONSTANZ, Germanujo.

Praktikante magnetismon, eksperimentan kaj medicinan hipnotismon, S-ro Nicot, Rue Saunerie, MONTPELLIER, Francujo, deziras kontakton kun samideanoj interesiĝantaj pri tiu temo.

Mi deziras korespondi kun multaj geknaboj. Hammerton (14-jara), 4 Tiverton Street, CLEETHORPES, Lincs., Anglujo.

Belgujo. Dussart Camille, Poste Restante, BRUXELLES I, deziras korespondi kun ĉiuj landoj, interŝanĝas pk., pm., gazetojn. Petas broŝurojn, librojn, k.t.p. por propagandi.

Esperanta Studrondo (komencantoj kaj progresintoj) en Johannesburg, Sud-Afriko, aranĝos letervesperon la 5an de aŭgusto kaj petas, ke oni bonvole sendu leterojn kaj poŝtkartojn al S-ro E. W. Woodruff, 10, 7th Avenue, EDENVALE, Transvaal, Sud-Afriko.

Plej suda Esperantogrupo de Brazilo aranĝos letervesperojn en Septembro kaj Novembro. Respondo garantiata. Adreso : Letervespero de Esperanta Societo de Pelotas, Caixa Postal 526, PELOTAS, R.G.S., Brazilo.

La Sunkrono estas bela verko de nederlanda verkistino Marie Koenen (tr. v.d. Vijver). Prezo 2ŝ. 3p., afranko 4p. (8 rpk.). Mendu ĉe UEA aŭ vialanda libroservo.

LERNIGU VIAJN INFANOJN laŭ la angla maniero! Progresema lernejo sendependa bezonas internulojn el ĉiuj landoj. Vidu kovrilpaĝon 4 de la maja numero kaj skribu al la lernejestro, Caius School, Kingston Buci, **SHOREHAM-BY-SEA, Sussex, Anglujo**.

Kiujn interesas kooperativo por konstruota "Vegetara vilaĝo" apud Hamburgo, bonvolu skribi al: Adolf Mosch, (14b) ERBSTETTEN, Krs. Ehingen/Donau, Germanujo.

16-jara junulo deziras korespondi: Stephen Cretney, 29 Queen's Road, CHADLE HULME, Cheshire, Anglujo.

Tri fraŭlinoj (24-jaraj) el Nov-Zelando deziras korespondantojn (-inojn) en Eŭropo. Nia intereso estas sciigi pri vivkondiĉoj en aliaj landoj. Kiu interesiĝas? Certe respondos. Nia adreso estas c/o F-ino Robson, P.O. Box 1202, Wellington, Nov-Zelando.

Deziras aĉeti brokajn librojn Esperantajn S-ro W. Bickley, Box 108, BULAWAYO, Rodezio.

Helpu min, mi petas, montri ke nia lingvo vere estas tutmonda. Propagandekspozicio okazos 6an de septembro ĉe kampara festo. S-ino Cant, "Highfield", Hexham Road, Heddon-on-the-Wall, NEWCASTLE UPON TYNE, Anglujo.

Personoj el la hindeŭropa lingvofamilio, volantaj helpi en vorttabeliglaborado (esceptante germanojn, nederlandanojn, ĉeĥojn, anglalingvanojn), bonvolu skribi al: Donald Broadribb, 791 South Avenue, ROCHESTER, New York, Usono. Nur seriozuloj ricevos respondon.

Novulo, 25-jara, serĉas korespondantinojn tutmonde, geinterparolantojn proksimajn, K. Heinz Niedrum, 53 Alexandra Road, SLOUGH, Bucks., Anglujo.

Aŭstralia edukisto kaj infanjuĝeja oficisto vizitos la jenajn landojn: Germanujo, Aŭstrujo, Svislando, Jugoslavujo, Italujo, Francujo. Deziras tranokti kun Esperantistoj, **nepre pagos**. Volonte vizitos lernejojn kie oni instruas Esperanton por stimuli intereson inter gelernantoj. F. Halls, 129 Castle Lane West, BOURNEMOUTH, Anglujo.

Verkoj de

WILLIAM SHAKESPEARE

Tradukitaj de STEPHEN A. ANDREW

Romeo kaj Julieto..	..	..	..	84 paĝoj
Antonio kaj Kleopatro	..	..	..	90 paĝoj
La Gajaj Edzinoj de Windsor	..	..	..	89 paĝoj

KAJ ĴUS ELDONIĜIS

Trojlo kaj Kresida..	..	..	..	94 paĝoj
----------------------	----	----	----	----------

Ĉiu teatraĵo broŝ. po 2ŝ. 8p. afrankite (8 rpk.)

Eldonitaj de :

THE ESPERANTO PUBLISHING COMPANY LTD.

Mendu ĉe enlanda libroservo aŭ ĉe :

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

